

Félix Navarro Clemente
Carrer 117, 16
Teléfono 23 30 81
VALENCIA - 8

HUNGARA VIVO

4

1973
8,- Ft

ABONO DE HUNGARA VIVO EN
EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. —
Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 3,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AUSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, téraire et Artistique Pa- A — 1200, WIEN I. Ru- A — 1011, Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PA-
FRANCIO: Agence Lit- KOREO: „Chul Bo” PHENJAN
GERMANA DEMOK- NEDERLANDO: Swets
RATIA RESPUBLIKO: te P. O. Box 6140 Etter-
zeitungsvertriebsamt, stad, OSLO
Fruchtstrasse 3—4, 1004,
BERLIN
AUSTRALIO: Cosmos NORVEGIO: A/S Nar-
Bookshop, 133 Ackland vesens Litteratur Tjens-
Street, ST. KILDA Vic. te P. O. Box 6140 Etter-
A. Keesing, 168—174 Day stad, OSLO
Street, SYDNEY, N. S. Fruchts-
W. 2000 BERLIN strasse 3—4, 1004,
BERLIN
BELGIO: Agence Messa- GERMANA FEDERA-
gerie de la Presse, Rue CIA RESPUBLIKO:
du Persil 14—22, BRU- Újváry-Griff Titurel
XELLES strasse 2, 8 MÜNCHEN
81.
BRAZILIO: Livraria SOVETUNIO: Sojuz-
Brody Ltd., Caixa Postal pechati, Import, Pros-
33366, SAO PAULO. Liv- pect Mira 112—a
raria D. Landy Rua 7 de MOSKVA
Abril, Caixa Postal 7943,
SAO PAULO Wilhelmstrasse 4, 7
STUTTGART 1. W. E.
BRITIO: Collet's Hol- Saarbach, Follerstrasse
dings Ltd., Denington 2, 5 KÖLN 1.
Estate, London Road,
WELLINGBOROUGH.
ISRAELO: Hadash, R.
The Danubia Book Co., Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
78 Shaftesbury Avenue, Lepad Ltd., 15 Rambam,
LONDON W. 1. TEL-AVIV Gondos Sán-
dor, Herzl 16, Bét Hakra-
not, HAIFA A. Fischer,
R. Strauss 3. JERUSA-
LEM
BULGARIO: Direkzia SOFIA
R. E. P. 11 Pl. Slawejkov
SOFIA
ITALIO: Avv. Andrei
ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. ALLSCHWILL
Lazar, Via Monte delle
S. — dovoz tisku, Vinoh- USONO: Center of Hun-
radska 46, PRAHA 2. P. Co. garian Literature Inc.,
N. S. — dovoz tisku Le- 1538 Scnd Ave., NEW
ningradska 14, BRATIS- YORK 10028.
LAVA Corvin Travel and Gift
JAPANIO: Nauka Ltd., cond Ave. NEW YORK
30—19, Minami-Ikeba- Parcel Service. 1590 Se-
kukuro 2-chome, Toshi- cond Ave., NEW YORK
ma-ku, TOKYO 10028.
JUGOSLAVIO: Forum,
Hungarian Books and
DANLANDO: Hunnia Vojvode Misica broj 1, Records 11802 Buckeye
Books and Music Lan- NOVI-SAD Jugoslo- Road, CLEVELAND,
gemosevej 37, BAGS- venska Knjiga, Terazije Ohio 44120
VAERD. 27, BEOGRAD
VENEZUELO: Luis Tar-
Ejnar Munksgaard Prags csay, Calle Iglesia Ed.
Boulevard 47, COPEN- and Record Studio, 19 Villoria Apt. 21 — 105,
HAGEN/S. Prince Arthur Street C. 24. CARACAS
West, MONTREAL 18.
FINNLANDO: Akatee- Que, Pannonia Books, 2 VJETNAMO: Phong
minen Kirjakauppa, Kes- Spadina Road, TORON- Phat Hanh Bao Chi 17,
kuskata 2, HELSINKI TO 4, Ont. Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj



Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
XIII. jaro, 1973. 4-a numero

Ĉefradaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai,
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada
Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy,
d-ro Lajos Lesznai, Alfonso
Pechan, Aurél Ponori Thewrewk,
Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi,
Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi,
Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludo-
viko Kókény, Sándor Szathmári, La-
jos Tárkony

La redakta komitato la unuan jaŭ-
don de ĉiu monato posttagmeze de la
tria ĝis la kvina horo havas akcep-
totagon. (Fp. VIII., Kenyérmező
utca 6.)

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona
Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi
út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abo-
nebla en ĉiuj poŝtofacejoj, ĉe la ga-
zetkolportistoj de la Centra Gazeto-
facejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest,
V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ
per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32,—, al
eksterlando krome Ft 6,40
por afranko.

73.599 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: 25.377

Numero pri S. Szathmári

ENHAVO

El la eĥoj de la verkaro de Szathmári	1
V. Benczik: Intervjuo kun S. Szathmári	2
S. Szathmári: Honorigo	
S. Szathmári: Urania	7
Panoramo	10
H. L. Barta: Kiu scias hungare? (Tr. Tárkony)	12
P. Balkányi: „Information Hungary”	12
Dro L. Lesznai: E-o kaj la muziko	14
I. Szenes: „Se mi estos ambasadoro en Turkio” (Tárkony)	15
L. Rieth: Orienta kolektaĵo de la H. Sc. Akademio	16
L. Rieth: Sukcesoj de la hungara ceramiko	16
Ernő Holló: Du poemoj (K. Kalocsay)	16
M. Gergely: Margit Kovács	17
L. Tárkony: Revuo de Revuoj	18
A. Pechán: El la vivo de hung. E-pioniro K. Seper	19
Subĉiela etnografia muzeo en Göcsej (tr. A Csiszár)	22
B. Szilárd: Alibio	24
Interesaĵoj	25
Humoro	25
Hungario en la spegulo de la mondekonomio	26
Nova scienca verko kun E-a resumo (E. F.)	26
I. Ráth-Végh: La netuŝebla verdikto (Tr. Kalocsay)	27
El la mondo de la lingvoj (Tr. Újlaky-Nagy)	28
Kiom da hungaroj parolas hungare en Usono kaj Kanado?	28
P. B. Kiam la hungara lingvo fariĝis oficiala ŝtatlingvo	29
Leterkesto	30
Intereskaptaj libroj	30
Elzameni sen risko (V. Benczik)	30
Krucvortenigmo (FERI)	31
Korespondi deziras	32
Foto sur la titolpaĝo — Göcsej — de János Elfert	

El la eĥoj de la verkaro de Szathmári

„Sándor Szathmári estas unu el la grandiozaj satiristoj de la nuntempa mondo, kiu okupas lokon samnivele apud siaj grandaj kaj mondkonataj fratoj (kiuj, cetere, estas liaj plej ŝatataj verkistoj) Swift, Wells, Anatole France, Madách kaj Karinthy. La fakto, ke li verkas pliparte en Esperanto, estas ĉefatuto por nia kulturo, kaj sekve por nia afero, kiun siatempe ni espereble komprenos meti en la ludon.

Tiujn du propoziciojn mi skribas senpardonpete, malgraŭ tio, ke nia esperantista publiko ne tro ŝatas rekoni siajn valorojn kaj preferas mildigi siajn pretendojn per ĉiaj seoj kaj sedoj kaj tamenoj.”

(William Auld)

„Sándor Szathmári aperas sendube kiel unu el la gravaj verkistoj de la nuna esperantlingva literaturo. (...) La verkoj de Szathmári ne estas puraj ludoj de la imago pri la estontaj mirakloj de la scienco; ili estas meditado super temoj, kiujn la aŭtoro pritraktas sufiĉe originale kaj alloge, sed kiuj okupadis longe la homan menson kaj certe ĝin okupos ankoraŭ longe. La legado de la verkoj de Szathmári ne estas nura distro, sed potenca instigo al pensado.”

(Michel Duc Gonninaz)

„La libro (Vojaĝo al Kazohinio) estas gaje amuza, sed samtempe edifa, incita kaj maltrankviliga, kun satiro trafa, akra, senindulga. Libro Janus-vizaĝa: ĝi pafas — eble eĉ kontraŭ la propra intenco de la aŭtoro — kaj kontraŭ tiuj, kiuj volas ekstermi ĉiujn sentojn ĝis sterileco, kaj kontraŭ tiuj, kiujn ĝisabsurde regas »sentoj«, »ideoj«, »tradicioj«. (Liajn novelojn) ... karakterizas satiremo vipanta tiranismon, servilismen, militismen kaj ankaŭ ĉiutagajn homajn ri-deblaĵojn.”

(Skizo de E-a literaturhistorio)

„... kara leganto, mi avertas vin: la libro estas insida. Formetinte ĝin, vi ne liberiĝos de ĝi; vi sentos, ke ĝi lasis en vi hoketojn de problemoj.

Fakte, la libro estigas en la leganto ion, kion oni povus nomi »stato post la ellego de Kazohinio«. Ne estas malfacile rekoni tiujn, kiuj suferas je tia stato: diru al ili ion en la lingvo hina, aŭ behina, ekzemple kazoo, ketni, aŭ kipu, ili tuj ekpalpebrumos al vi, kiel al komplico aŭ havanto de komuna sekreto, kaj post unu horo vi rimarkos, ke vi estas droninta en nefinebla diskuto.”

(Kálmán Kalocsay)

„... La formo de la elverko ne ĉiam estas la plej riĉa, la historio foje-foje povas aspekti pala, la redakta kapablo de la aŭtoro ne povas esti nomita perfekta, sed, ĉiukaze, Szathmári estas inteligenta pensulo ...”

(Emil Kolozsvári Grandpierre)

„La apero de tiu ĉi libro (Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj) de Sándor Szathmári ĝustigas maljustaĵon. Ĝi ne nur prilumas longe ombritan parton de la tradicio de la hungara sciencfikcia literaturo, sed, eĉ se kun iom da malfruo, honoras maljuste ignoritan verkiston. Ĝi konigas pruvon al la hungara publiko pri tio, kion la esperantistaj legantoj jam delonge sciis, nome, ke Sándor Szathmári ne estas »unulibra verkisto«.”

(Keresztúry Dezső)

„Mi ĉiam skribis pri la homo...”

Intervjuo kun Sándor Szathmári

Sinjoro Szathmári, en la pasinta jaro aperis du viaj libroj en la hungara lingvo: la kvara hungara eldono de Vojaĝo al Kazohinio kaj kolekto de viaj rakontoj sub la titolo »Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj«. Kion vi sentis prenante la novajn librojn en la manojn?

—Kompreneble mi ĝojis, kvankam mem ne multon faris por la eldono — sinecere, mi malŝatas la almozpetadon. Mi atendis, ke la eldonejoj serĉu min, ja mi estis certa, ke ambaŭ miaj libroj estas valoraj. Aparte mi ĝojas, ke *Vojaĝo al Kazohinio* aperis en 30 000 ekzempleroj kaj estas tre malkara (kostas 13 forintojn — prezon de du skatoloj da cigaredoj), do multaj povas ĝin legi. Tamen, la rekonon mi sentas iom malfrua: mi havas 76 jarojn kaj mia sano estas tre malbona. Mi ne scias, kiom da tempo restis por mi, sed ne multe...

—*Oni povus starigi la demandon: ĉu via unua libro — Vojaĝo al Kazohinio — verkita antaŭ preskaŭ kvardek jaroj, havas ion por diri al la nuntempa homo?*

—Certe! Ĝi estas nun eble eĉ pli aktuala, ol pli frue. La baza penso de miaj verkoj estas la jena: la homo havas en siaj manoj altnivelan teknikon, kiun cetere li mem kreis, sed liaj propraj biologiaj ecoj eĉ nun estas sur la nivelo de la prahomo, aŭ evoluis nur tre malmulte ekde la prahoma epoko. Se *du* prahomoj vidis sur la arbo *unu* pomon, la pli forta aŭ pli lerta el ili mortbatis la alian kaj manĝis la pomon. Tio estis tute normala en tiu epoko, ja la interhoma batalo estis la bazo de la ekzisto. Sed nun ni havas ne nur *unu* pomon, sed tiom, kiom ni *volas* produkti! Sekve la interhoma batalo ne estas bazo de la homa ekzisto, eĉ, ĝi malhelpas la ekziston kaj evoluon, kies bazo estas la *kunlaboro*. Bedaŭrinde, la kunlaboremo preskaŭ tute mankas al la homo; kiu eĉ nun havas prahoman instinktaron.

Revenante al via demando: dum la lastaj jardekoj nedireble multon evoluis la tekniko, sed la homo mem preskaŭ neniom, do, la diferenco inter la evolugrado de la homo kaj tiu de la tekniko multe kreskis. El tio sekvas, ke la admono de *Vojaĝo al Kazohinio* estas eĉ pli valida, ol antaŭ tridek naŭ jaroj.

—*En Hungario tre oftas renkontiĝoj inter verkistoj kaj legantoj. Ĉu vi partoprenis tian renkontiĝon?*

—Jes, amatora trupo de Budapeŝta gimnazio prezentis dramigitajn fragmentojn el *Kazohinio* kaj mi estis invitita al la spektaklo. Post la prezentado la lernantoj direktis al mi aron da demandoj, kaj mi devas agnoski, ke ili demandis tre saĝe. Mi havas la impreson, ke la nuntempa junularo multe pli komprenas mian direndon, ol la antaŭaj generacioj, kaj tio sendube estas fakto tre esperiga. Surprizis min la afero, ĉar ĝis nun la vivon de miaj verkoj akompanis tre multaj miskomprenoj kaj misprezentoj, bedaŭrinde, ĉefe el esperantistaj fontoj. Post la apero de la Esperanta eldono recenzanto de brazila esperantista gazeto starigis al mi la demandon: kial mi volas ekstermi la anglosaksojn per gaso? Kompreneble, tiajn stultaĵojn diris ne nur esperantistoj. Post la milito iu gratulis al mi, ke mi antaŭvidis la ekstermon de judoj. Tiel stultajn komentojn la nuntempaj junuloj ne faras.

—*Vi havas tre propran pozicion en la literaturo, ja ambaŭ literaturoj — la esperanta kaj la hungara — konsideras vin sia verkisto. En la lasta numero de Norda Prismo (1972/3)*

aperis intervjuo kun Kalocsay, kaj li parolas tre skeptike koncerne la ekziston de la esperanta kulturo. Kion vi opinias pri tiu demando?

—Mi ne konas la intervjuon, sed diskuti pri la ekzisto de la esperanta kulturo ne havas sencon. La esperanta kulturo povas esti evoluigata, ĝi devas esti evoluigata, kaj ĝi ankaŭ per si mem evoluas, ĉu ni volas, ĉu ne. Mi verkis proksimume la duonon de miaj verkoj en Esperanto, sed ili ĉiuj — ankaŭ la hungare verkita parto — estas nepre pli esperantaj t.e. internaciaj, ol tipe hungaraj, ja neorientita leganto malfacile divenus, ke la aŭtoro estas hungaro.

—*Se ni jam tuŝis la esperantan kulturon: ni havas tre interesan koincidon inter la pensoj de via verkaro kaj La Infana Raso de Auld. Ĉu?*

—Jes, tio ekzistas, ja ankaŭ Auld konsideras la nunan homon ne sufiĉe evoluinta, t.e. „infana”. Kompreneble, tiu koincido ne signifas, ke li prenis la ideon de mi, sed simple ankaŭ li venis al la samaj konkludoj, kiel mi. Ne estas hazardo, ke li apartenas al la fervoraj ŝatantoj de miaj verkoj. Krom *La Infana Raso* miaj verkoj havas plurajn parencojn en la mondliteraturo. Tia parenco estas ekzemple *La Tragedio de l' Homo* de Imre Madách, kiun mi konsideras unu el la plej grandaj verkistoj de la mondliteraturo. En lia dramo mi renkontis miajn proprajn pensojn, kaj tio kompreneble firmigis miajn konkludojn. Alia spirita parenco estas Frigyes Karinthy, hungara verkisto, kiun mi povus nomi mia spirita patro. Cetere li estis la unua aprecio de *Kazohinio*. Kaj tre granda estas la simileco inter *Kazohinio* kaj *La brava nova mondo* (The brave new World) de Huxley. Mi verkis *Kazohinion* du jarojn antaŭ la apero de la libro de Huxley — post ĝia apero certe mi ne kuraĝus verki ĝin tia, kia ĝi estas. Tamen, konsiderinda diferenco inter la du libroj jam ekzistas ankaŭ en la

verkista sinteno: la libro de Huxley estas pura beletraĵo, dum Kazohinio apartenas plie al la kategorio de la filozofiaj romanoj.

— *Ĉu vi verkas ion novan? Kiam ni povos legi novan Szathmári-verkon?*


— Ne. Mi ne laboras. Jam de du jaroj. Mi estas malsana, kaj nur pene mi kapablas koncentri miajn pensojn.

— *Ja ĉe la apero de la unua hungarlingva eldono la plimulto de la legantoj konsideris la unuan parton de Kazohinio „negativa utopio”. Tio estas eraro, ĉu ne?*

— Kompreneble. La vivo de la hinoj estas „pozitiva utopio”, ja laŭ mia opinio la homaro devus evoluigi sin mem por fariĝi tia. Mi ne miras, ke tiu vivo por la nuna homo povas ŝajni monotona, senkolora, sed ne ekzistas por la homo alia eblo de kunvivo kun la perfekta tekniko. La hinoj trovis la manieron vivi logike, do, laŭ la postuloj de la tekniko. La tekniko traretis nian vivon, ni ricevis kaj ricevos de ĝi multajn avantaĝojn, kaj por tiuj avantaĝoj ni kompreneble devas pagi, rezignante pri nia maldisciplinemo, konkursemo ktp. Do, per la prezento de la vivo de la hinoj mi tute ne volis fortimigi la homojn, male, mi volis prezenti al ili, jen, tiaj vi devas fariĝi, se vi volas konservi la homan vivon sur la tero. „Negativa utopio” inter miaj verkoj estas ekzemple *Honorigo*, kiu vere devas esti fortimiga...

— *Ĝi estas la modelo de supermoderna faŝismo...*

Jes, la homoj en tiu novelo ne kapablis rekonii la neceson ŝanĝiĝi, kaj ili pensas prahome, kvankam havante modernegan teknikon. Pro sia prahoma instinktarulo ili utiligas tiun brillan teknikon por militi kontraŭ aliaj landoj kaj ankaŭ por subpremi la samlandanojn. Kaj elformiĝo de tia sistemo estas tre facila. La moderna tekniko — kiu faras nian vivon pli vivinda — postulas de la homo *disciplinon*. La hinoj komprenis tion kaj vivas feliĉe. Kaj ankaŭ libere. Ilia



libereco estas tiu de la rekonita neceso...

— *Tio estas la marksisma difino de la libero...*

— Kompreneble. Male, la figuroj de *Honorigo* ne akceptis memvole la disciplinon, ĉar iliaj instinktoj estis sovaĝaj, sekve iliaj ĉefoj perforte devigis ilin. Jes ja, sed tiuj ĉefoj ankaŭ havis sovaĝajn, t.e. prahomajn instinktojn, do ili subjugis la subulojn, misuzis sian potencon. Cetere, tio estas malbona esprimo. Dum potenco estas necesa, oni ĉiam misuzas ĝin, ĉar la homoj estas nesufiĉe evoluintaj. Kiam ili atingos la evolugradon, sur kiu jam neniu misuzos la potencon, en tiu momento mem la potenco jam estos superflua. Revene al la demando, oni povas diri, ke antaŭ la homo staras du ebloj: ĉu la vivo de la hinoj, ĉu la vivo de la figuroj de *Honorigo*. Proksimume... Jes ja, la rakonto *Maŝinmondo* ankaŭ estas tiaspeca „negativa utopio”. Tre eble *Honorigo* estas stacio sur la vojo, kiu kondukas al la fino prezentita en *Maŝinmondo*...

— *En pluraj viaj noveloj oni trovas iajn aludojn, kiuj supozigas, ke vi intencis direkti pikon al la personkulta sistemo, kiu funkciis en Hungarlando ĝis la mezo de la kvindekaj jaroj. Ekzemple, en unu el viaj noveloj la nokte pordrapantan fantomon oni alparolas „kamarado”. Ĉu tio havas interrilaton kun la tiamaj noktaj arestoj?*

— Ne. Estas nur hazardo. En alia novelo — en la hungara varianto de *Genezo* — Dio alparolas la Diablon „mister”. Skribante tion eĉ ne venis en mian kapon aludi al la usonanoj. Ĉiam mi klopodis deteni min de la konkretaj aludoj, ja tiuj povus nebuli la esencon de miaj pensoj, mallarĝigi la validecon de miaj konkludoj. Mi tute ne intencis ataki iun ajn socian sistemon aŭ politikon. Mi ĉiam skribis pri la homo, pri la homa naturo.

— *Sinjoro Szathmári, mi dankas la intervjuon.*

Vilmos BENCZIK

Honorigo

— Yel Palva! — laŭtlegis la notario.

Palva, vestite nur en kalsono, enpaŝiŝ. Transdonis sian rekrutalvokan leteron. Siajn suprajn vestojn li metis sur seĝon.

La kuracisto explore rigardis la korpon de Palva. Ties okulojn kaŝis per siaj manplatoj, poste li forprenis la manojn, observante la refleksojn.

— Ĉu vi ne estas miopa? — li demandis.

— Tute ne! — protestis Palva. — Mi legas ĉiam sen okulvitroj.

— Ĉu vi legas multe?

— Absolute ne! Mia profesio okupas min per tute aliaj laboroj.

— Mi atentigas vin, ke misinformi la rekrutkomisionon estas komunum-ofenda ago. Hodiaŭ, kiam la friponaj malamikoj de la homaro minacas per finpereo ĉies feliĉon, la patrio bezonas bravajn, batalemajn soldatojn.

Palva ankoraŭ ne estis starigita antaŭ la tubon de la falsometro, do li respondis senemocie:

— Se mi estos honorigata per soldatiĝo, mi plenumos mian ornamplenan honoron kun la plej granda entuziasmo, sed tamen mi devas rimarki, ke mi sentas min tute sana.

Nun li estis starigita en la rentgenaparaton. La aparato susuris, la kuracisto atente observadis la ekranon.

— Nu — li kontraŭjetis triumfe —, tiu ĉi koro tamen ne estas nomebla tute sana!

— Kio do! — protestis Palva. — Mi loĝas sur la sepa etaĝo kaj mi neniam atendas lifton. Mi laboras en la albuminfabriko numero 112 eĉ hodiaŭ pezan korplaboron.

— Tio estas nur via persona aserto.

La komisionestro interdiris:

— Ni devas ebligi al la kandidato pruvi sian aserton. Ĉu vi havas dokumentojn?

Palva paŝis al siaj vestoj, elpoŝigis kaj transdonis peceton da papero. La komisionestro tralegis, iom meditadis, kaj ekdiris al la kuracisto:

— Ceteraĵo?

— Ne estas ceteraj rimarkindaĵoj.

— Do, li vidiĝas sufiĉe fortika homo. Ne verŝajnas iaspeca malsano. Nu, bonvolu enskribi — li turniĝis al la notario —, ke li estas korpe netaŭga por militservo. Sekvos la spirita rekrutado!

Palva estis starigita antaŭ tabulon. Vidalvide al li, la tubo de la falsometro, direktita al li. La profesoro funkciigis la aparaton, la tubo komencis fosforeski.

— Jen la kreto — diris la profesoro. — Bonvolu

skribi la formulon de la rotacia parasfero en kazo de hiperbole rapidiĝaj protonoj.

Palva alpaŝis la tabulon kaj komencis skribi:

rot =

Poste li haltis.

— Nu? — demandis la profesoro. — Kion vi intencas kun tiu rotacio? Ĉar io rondiras, ĝia formulo ne nepre komenciĝas per „rot”. Mi petas, skribu la matriksojn!

— Tiujn mi ne scias.

La signallampo de la falsometro akre ekfulmis, okazigante ĝeneralan ridon.

— Do, vi tre bone scias — respondis la profesoro. — Jes, antaŭ cent jaroj, ĉirkaŭ 1950, oni ankoraŭ povis mensogi sendanĝere, sed hodiaŭ la aparato jam malkaŝas la mensogulon. Kiom da mensogprocentoj? — li demandis la aparatiston.

— Naŭdek sep — tiu legis el la bendo.

La profesoro paŝis al Palva kaj metis la manon sur lian ŝultron.

— Vi estas spirite taŭga, kara amiko. La armeo bezonas soldatojn, kiuj ne estas sufiĉe fortaj por la peza laboro de la civila lando, sed kiuj taŭgas al la altaj spiritaj pretendoj de la militado. Vane vi provus eskapi, vi taŭgas. Soldatiĝi estas granda kaj bela honorigo, kiun ni ĉiuj akceptas ĝojplene kaj danke.

Nun li subite ekpensis, ke li eble staras en la radio-kampo de la aparato. Ektime li alrigardis, sed jam malfrue. La lampo forte ekbrilis.

Rapide li forpaŝis kaj la lampo estingiĝis. La komisionuloj restis ŝajne senemociaj, ili kondukis, kvazaŭ ili nenion estus rimarkintaj. Eĉ Palva ne kuraĝis rideti. Li nur deklaris:

— Se mi estos honorigata per soldatiĝo, mi plenumos mian ornamon devon kun la sama ĝojo, kiel vi, profesoro.

La lampo restis senluma.

Nun sekvis mallonga diskuto. La civillanda komisaro ne volis transcedi Palvan.

— Jam nun ni povas plenumi niajn taskojn nur plej malfacile — li diris. — La kandidato estas forta homo. Li purigas la bestojn, portas la sterkon. Tia forta homo devas resti en sia profesio.

La profesoro, aŭdante la vortojn, pleniĝis per enio. Lia unika filo antaŭ unu monato heromortis.

— Malnobla laboro — li diris per kolertremanta voĉo. — Kaj tia eminenta homo aŭdacis sekreti pri siaj kapabloj, kiam li povus esti honorigata!

La civillanda komisaro denove ekprovis reteni Palvan, sed la komisionestro finis:

— Mi fermas la diskuton. La kandidaton ni honorigas per soldatiĝo. Mi petas la notarion enskribi la nomon de Yel Palva en la ornamalbumon de tiuj rajtigitaj al gloro. Li rajtas aniĝi al la grupo „Pacamo”.

Vespere li rendezvuis kun Minda en la parko.

— Nu? — ŝi demandis ekscitite. — Kio okazis, Yel?

— Mi estas honorigita.

Minda senforte faldiĝis sur la benkon.

— Kaj al kiu grupo vi estis direktita?

— Al la „Pacamo”.

— Ne parolu rebuse! Mi jam scias, ke la grupo „Mizerikordo” manipulas per la ALFA-jetmaŝinoj, per kiuj ili kripligas la irison de la okuloj, blindigante la malamikajn soldatojn, la grupo „Bonkoreco” direktas la ultrason-maŝinojn por disfaligi la ĉelojn de la histoj de la korpo, sed kion signifas „Pacamo”?

— Tiu estas la grupo de la sekvatoroj.

— La satanoj! — ekkriis Minda. — Tiu estas la plej danĝera.

— Nu, jes. Neniu intencas ekstermi la civilularon de la malamiko, ĉar la celo de la milito estas ĝuste konkeri subjugitajn laborantojn. Kaj kiel la ŝtatestroj profitus el tio, se ili jam komence neniigus la vivantan produkt-materialon? Tial estis eltrovita la sekvatoro, por ke ni ekstermu nur la militistan elitaron de la malamiko. La palpatoroj esploras la individuajn ondolongojn de la malamikaj militestroj, poste ni ekirigas la sekvatoran raketon, kiu alveninte disfaligas ĝuste la ganglionejn de la nervaro de la celito.

— Sed la malamiko ĝuste pro tio atakas plej forte la sekvatoristojn.

— Tute ne mirinde. Ankaŭ ili scias, ke tiu ĉi estas la plej danĝera militilo kontraŭ la militestroj, kaj ĝi bezonas la plej grandan scion. La nunan militon batalas nur sciencistoj kontraŭ sciencistoj. Sanan, fortan kaj stultan homon oni ne soldatigas.

— Do, ili nun forrabas vin de mi!

— Ankoraŭ necerte. Nun jam ne troviĝas frontoj. La atakoj estas direktataj el la interna lando kontraŭ la interno de la alia lando, eĉ tie nur kontraŭ militistaj celoj por ne disrompi la konkerotajn urbojn, fabrikojn kaj laboristaron. Oni atakas nur la militajn fokusojn, kiuj estas dissemataj en la tuta lando, zorge apartigite de la produktado, kaj vi nepre scias, ke ĝuste apud ni troviĝas unu el la fokuso. Eble mi posteniĝos tie.

— Eble! Eble! — mansvingis dolore Minda. — Kiel tio utilis al mi? Mi jam esperis travivi nian junecon unu apud la alia. En via sesdekjara aĝo oni forportu vin, ĝis tiam ni povus vivi bele.

— Ho, jes. La sesdekjara homo estas korpe malforta, por genero jam apenaŭ taŭga, li ne povas plenumi la civillandan fortostreĉon, sed aliflanke li havas vastajn spertojn, multon li scias. Por sidi, kalkuli, observi la aparatojn, eksperimenti en la laboratorioj li estas tre taŭga, do li estas la plej uzebla materialo por militservo.

Minda senpacience interdiris:

— Ho Yel, Yel, kial vi trompis min?

— Ĉu mi? Ĉu vin? Sed Minda, mia dolĉa Minda!

— Jes, vi! Ĝuste vi! Kiomfoje mi diris al vi, kiam vi amindumis al mi, ke mi deziras nur sanan kaj stultan viron! Ĉu mi ekamu lin kaj ili forrabu lin de mi? Vi ĵuris, ke vi estas stulta kiel kukurbo, kaj mi kredis al vi. Mi ekamis vin, kaj jen — nun alvenis via mortkondamno, kio estas same ankaŭ mia morto. Ho Yel, kial vi trompis min?

Plorsingulte ŝi kliniĝis sur lian ŝultron. Li tenere karesis ŝian kapon.

— Mi ne trompis vin, anĝe! Mi certigas vin, ke mi plenforte klopodis en la lernejo por nenion ellerni. Se nur tiu damnita falsometro ne estus eltrovita!

— Ne, Yel, mi jam nenion kredas al vi — plorsingultis la knabino. — Se vi estus stulta, kial ili povis pruvi, ke vi scias? Ĉar korpe vi estas forta, mi ja scias tion. Preskaŭ vi premrompas min, kiam vi brakumas.

— Bone vi scias, koreto mia, ke jam en la lernejo ne eblas tute nelerni. Ankaŭ tie estas falsometro. Se mi diras: „Mi lernis, sed mi ne scias”, la aparato tuj signalas, la lampo ekbrulas, kaj la profesoro tuj donas la „elkoran apogadon”: duhora dentdoloro en la dentonerv-enradianta kamero. Ho Minda, kiomfoje mi sidis en tiu! Lastfoje mi ricevis jam triagradan dentdoloron kiel elkoran apogadon, ke mi jam hurlis pro la inferaj turmentoj kaj mi petegis indulgon. Je tiaj okazoj mi decidis, ke mi ĉiam lernos bone, ĉar mi jam ne havis kuraĝon por nelerni.

— Satanaj ekzekutistoj!

— Ne malbenu la profesorojn, ho Minda. Ankaŭ ili raportas antaŭ falsometro al la direktoro, kaj se ili diras, ke „la nelernintojn mi laŭregule apogis”, kvankam ili ne punis la nelernintojn, tiam la falsometro eklumus, kaj vi scias, ke ili estas ankoraŭ pli severe punataj. Kaj la direktoro estas same kontrolata, kiel ĉiu homo sube, supre kaj pli supre, tute ĝis la Plejamata Ŝtatpatro. Li estas la sola, kiu dependas de neniu, kaj en kies manoj koncentriĝas ĉiu suferigo...

Yel subite eksilentis kaj ektime li ĉirkaŭrigardis, sed Minda furioze interkriis:

— Jes, diru nur la veron! Ne silentigu min! — ŝi diris, vidante, ke Yel time klopodas ŝian kapon tiri al sia brusto. — Ĉi tie ne estas mikrofonoj, kaj por mi estas jam tutegale, eĉ, se mi estos portata sur ŝtiparon! Kial ni nomus ankaŭ inter ni la suferigon „elkora apogado” kaj „amika helpo”?

Yel klopodis flankenigi la diskuton.

— Do, post la dentdoloroj mi jam devis iom lerni la lecionojn.

— Do, vi tamen lernis! — diris Minda riproĉe.

Denove ŝi ekploris. Yel elprenis poŝtukon el la retikulo de Minda kaj sekigis ŝiajn okulojn.

— Ne ploru, kara! Ĉi tio estas pli dolora sufero por mi, ol ĉiaspeca elkora apogo. Mi ĵuras, ke mi

provis ĉion eblan por ke mi lernu sed ne sciu, ke ili ne povu min disigi de vi. Ne nur por via intereso, sed por mia feliĉo. Tiu estas vi mem. Mia feliĉo!

Minda levis sian kapon kaj ekridetis tra la larmoj. Si donis aerfacilan kiseton sur lian okulon.

— Ho, mia eta pseŭdostultulo! Kiel do tamen vi ellernis la lecionojn?

— Mi ĵuras al vi, Minda — kaj mi bedaŭras, ke nun ni ne ĉehavas falsometron por kredigi miajn vortojn — do mi ĵuras al vi, ke mi provis ĉion eblan ankaŭ post la dentdoloroj. Lernante la lecionojn mi klopodis ĉiam pensi pri vi. Anime mi ĉiam estas kune kun vi, sed dum lecionlerno mi klopodis per ĉiuj miaj nervofibroj kroĉiĝi al vi, por ke mi ne komprenu la legataĵon. Tiamaniere mi povis diri trankvile al la profesoro: „Mi lernis, sed mi ne scias.” Poste, dum la lecionlernado mi eĉ kalkulis mute, en mia kapo: „Unu-du-tri-kvar-kvin...” Sed tiu ĉi metodo jam estis iom perfortita, kaj dum la raporto la lampo iom ekbriletis. Do, la kalkuladon mi ne daŭrigis. Pensi pri vi ĉiam estis facile kaj tio sufiĉis. Dum la ekzameno mi estis reĵetita kaj mi fariĝis purigisto en la albumin-fabriko. Multaj miaj enviantoj preskaŭ krevis.

— Sed kiel vi tamen sciis dum la rekrutigo?

— Ĉar mi havas damnite malbonan cerbon. Vane mi klopodas nescii, io tamen engluiĝas. Tiun formulon, kiun ili demandis pri la rotacia parasfero, mi legis ĝuste post terura dentdoloro. Tiam mi estis frakasita, mortsuferigita. Mi jam povis pensi pri nenio, mi ne povis jam sufiĉe nelerni, kaj tial, iamaniere, la formulo tamen ŝoviĝis en mian kapon.

— Kaj ili demandis ĝuste tion! Kian fatalon vi havas, mia kompantinda Yel!

— Mi devas konstati, ke miaj kvalitoj iom post iom degeneriĝas. Kiel ajn mi klopodas mallerni, tamen multaj engluiĝas en mian kapon, kaj mi jam ne povas sufiĉe perfekte forgesi. Certe miaj kapabloj malperfektiĝis.

— Kompantinda mia Yel! Kaj de kiam vi rimarkis tion?

— Antaŭ du jaroj. Kaj de tiam mi ankoraŭ pli admiras vin, anĝelete, ĉar vi ne havas tiaspecajn malperfektaĵojn! Ho Minda! — Li ekkriis. — Mi scias, ke vi jam malrespektas min, sed tamen ne forpeli min! Mi ne eltenas la vivon sen vi!

La knabino mole sin alpremetis.

— Kiel vi imagas, mia trezoreto? Mi ekamis vin kaj mi ne povas jam vin forlasi.

Post longa silentado Yel ekparolis.

— Se almenaŭ mi estus ĉe la grupo „Humanismo”

— Kio estas tio?

— Tie estas la radiiloj, kiuj ĵetas la stultigajn radiojn al la malamiko. Foje — kvazaŭ mi farus tute hazarde — mi saltus en la radifaskon. Sed ĝi estas jam severe gardata kaj jam tute ne utila.

— Kial?

— Okazis, ke ankaŭ la maŝinistoj mem ensaltis, por esti eligotaj el la armeo. Fine la ŝtato superruzis

ilin kaj planigis tiaspecajn maŝinojn, kiujn eĉ stultaj homoj povas direkti kaj nun ili uzas nur stultulojn. Por tiuj ĉi nenion utilas la ensalto.

— Do, nenia eskapo! Yel, mia kara Yel, almenaŭ ni mortu kune!

— Mi pensadis multe pri tio, mia kara. Fine do, ĉiu cerbumas pri tio. Sed kiel morti? Vi nenie ricevas rapidefikan venenon, ja ĉio estas en la manoj de la Plejamata Ŝtatpatro. Kuirgaso jam delonge ne estas. Malrapidaj venenoj valoras nenion, ĉar se vi iutage ne venas en vian laborejon, la personradaro tuj palpserĉas vin, vi estos trovata kaj sanigota. Riverensalti? La personradaro ankaŭ tie trovos vin kaj vi ja scias, ke oni povas revivigi eĉ la tritagan droninton. La etaĝaj fenestroj jam ne estas malfermeblaj, la ventoladon faras la kondicionatoro kaj la ŝtalvitron de la fenestroj vi ne povas rompi eĉ per sieĝa trabego. La ŝtuparejo estas tiom malvasta, ke vi ne havas spacon por desalti. Pafilo jam delonge ne estas. Ĉu la tranĉilo? Se vi trapikas vian koron mem, vi ricevos motoran korprotezon, kaj rezultiĝos, ke vi estos soldatigita, kiel kripulo. Ĉu elektra frapo? Tiu nur svenigas, sed oni revivigas vin, por ke ili poste havigu al vi la plej teruran elkoran apogon pro la krimo de mortdizerto.

Kelkajn minutojn ili ambaŭ profundigis en malgajan silenton. Poste Yel daŭrigis:

— Ja estas precize organizita la *Gardistaro de la Feliĉa Sano!* La popolleĝo de la *Vivdevo* preskaŭ tute ekstermis la antaŭe disvastiĝintajn mortdizertojn.

Minda ekĝemis.

— Do, estas nenia rifuĝo!

— Sed estos, mia kara! Vi nepre scias la proverbon: „Ili tamen ne povas nin novnaski!” Kiom ajn multe ni suferas, tamen ni havas sume nur unusolan vivon, kiu foje tamen finiĝos kaj kiom ajn multe valoras por ili la homo, foje tamen ili perdas. Sed almenaŭ, dum ni devas vivi, ni amu unu la alian. Ĉi tiun senton ili neniel povas forrabi.

— Jes, vi pravas. Yel, ni estas esence tre riĉaj, ĉar ni amas. Ni amu unu la alian, Yel tiom pli, ĉar morgaŭ fariĝos ĝojtago.

Yel dolore demandis:

— Do, morgaŭ mi ne vidos vin?

— Bedaŭrinde, estos ĝojtago en nia laborejo. Ni devos eniri je la sesa matene, labori ĝis la dudeka horo vespere, kaj ni devas plenumi kvardekkvinprocentan superprodukton. Tiom ni devis oferi proponi. Post la dudeka, ĝis la dudekkvara horo okazos ĝojkunveno, dum kiu mi devas celebri la ceremonion de la Popolfeliĉo, kaj mi estis honorigita por prelegi la laŭdon de la Plejamata Ŝtatpatro. Sed ne ektimu, mi jam verkis la apoteozon, por ke mi nun estu tute via. Venu, trezoreto!

— Ni iru, kara! Sed sekigu viajn okulojn por ne montri larmojn. Kaj hejme vi ne forgesu laŭtediri la formulon: „Egemifeliĉas-hoplejamata-patromia”, ĉar tie jam troviĝas mikrofono kaj telefoto.

Ili ekstaris kaj ekiris tra la strato „Vivulaliberfeliĉahomsocieto” al sia komuna litejo.

Urania

Foje vespere mi studis la atomfizikon. Mian fantazion okupis la atommodelo de Bohr. Ĝi jam ofte estis refutita, sed, strange, ĉiu refuto ankaŭ konfirmis ĝin: centre la pozitiva kerno kiel suno, kaj ĉirkaŭe, sur kvantumitaj orbitoj, rondiras la elektron-planedoj. Kaj, por ke la simileco farigu eĉ pli kompleta, tiuj ĉi planedoj same rotacias, kiel la grandaj planedoj. Perfekta modelo de la kosmo.

Kia simbolo! La renkontiĝo de ambaŭ senfinaĵoj! Kaj ĉu la senfina grandeco de la kosmo ne estas samtempe la ereto de io, de eĉ pli granda estaĵo? Kaj plue: ĉu ne grandioze, ke la meze staranta homo disetendis sian vidon al ambaŭ direktoj?

Jes, la scienco kaj la progreso estas nure homaj ecoj. La vojo farita de post la fajrobruligo ĝis la atomenergio promesas neimageblan horizonton. Kio do ankoraŭ? Kion la venonto alportos?

Enpensiginte mi rigardis en la aeron. Vidalvide, sur la libroŝranko, staris malgranda Urania-statuo. La kutima formo: en romana vestaĵo kun abundaj faldaĵoj, en ŝia mano la terglobo, en la alia: bastoneto, per kiu ŝi montris al la globo. Ĉirkaŭ ŝia buŝo vibris arĥaika rideto, ŝajne, kvazaŭ ŝi amuziĝus pri miaj cerbostreĉoj.

— Kial vi ridetas? — mi pensdemandis ŝin. — Vi estas senmorta muzo. Vi certe scias pli bone, sed kiel sciu mi, mortemulo mizera, kien kondukas la vojo de la progreso? Ĉu ĝi finiĝos iam? Kaj kie?

Urania plumontris al la terglobo.

Jes, ŝi estas reale senmorta. Farita el ŝtono, el senorgana materio, do el la sola senmortaĵo de la mondo.

Sed la organa vivo estas ankaŭ senmorta! La individuo mortas,

sed la vivo mem pludaŭras. Eĉ pli: ĝi senĉese perfektigas. Kaj plej rapide progresas la homa vivo, la scienco kaj kune kun tiu la socio. Kie ĉio ĉi finiĝos?

Mi forturnis miajn okulojn. Min ĝenis ŝia senĉesa rideto.

Kaj jen, kiam mi forturnis mian rigardon, en la angulo de miaj okuloj mi ekvidis iaspecan moviĝon.

Ektime mi alrigardis: antaŭ mi ŝvebadis ia homsimila figuro.

Kiel povis okazi, ke mi ne ekvidis lin? Kiel li povis sin sensone alŝteli? Kaj kiel mi ne ekvidis lian ombron, kiun la malantaŭa lampo devis projekcii?

Kiam mi observis lin pli detale, mi ektime saltleviĝis: la figuro *ne havis ombron*. Eĉ pli: li ŝvebis en la aero, super la planko. Liaj kruroj postŝvebis oblikve. Li havis lipharojn, barbon, portis nigran vestaĵon kun amelitaj kolumo kaj manumoj, laŭ la jarcentkomenca modo.

La fantoma fenomeno tiel koro-frapis min, ke mia spiro haltis. Mi volis ekkrii, sed mia gorgo kunpremiĝis.

— Trankviliĝu — eksonis nun la fenomeno. — Kion vi nun vidas, tio estas neniel supernatura.

La sonon mi aŭdis, sed la lipoj de la fenomeno ne moviĝis, liaj okuloj rigardis ne min, nur senceladis en la aero.

Kaj li naĝis unu paŝon pli proksimen al mi. Mi ekterurite retiriĝis kaj li haltis.

— Nu, ne timu! — eksonis de nove la voĉo. — Mi jam konjektas, kio vin timigis: la senpezeco. Ĉu mi pravas?

— Je... jes... mi balbutis. — Kaj la ombro...

— Ah, la manko de mia ombro! Jes, tio povas esti mirinda por vi.

Sed neniel supernatura, nek mistika. Ĉu vi jam komprenas?

— Ĉu kompreni?... Kiel mi povus kompreni?... La senpezeco sur la tersurfaco...

— Sed la kinon vi verŝajne komprenas, ĉu ne?

— Ĉu la kinon? Kion komunan ĝi havas al nia afero? — mi demandis iom pli kuraĝe.

— Iam oni inventis la kinon. La homoj komence miris la moviĝon de la bildo, sed poste ili kutimiĝis al ĝi. Tiam venis la kolorbildo, poste la parolanta kino, pli poste la plastika filmo. Kaj post tridek jaroj, kiam sur la teatra scenejo moviĝos, irados, dancos, parolos kaj kantos tridimensiaj, koloraj homfiguroj, bruos la trakurantaj lokomotivoj, tondros la akvofaloj, kiuj konsistos el nuraj lumfaskoj, tiam vi konsideros tiujn neniel supernaturaj fenomenoj kaj tute ne primiros ilin, kvankam la figuroj konsistos el nemateriaĵo, eĉ pezon ili ne havos kaj, se la reĝisoro ne projekcios al ili ombron, tiam ili eĉ ombron ne havos.

— Sed ĉu vi ne bonvolus malkaŝi, kun kiu... aŭ pli korekte: kun kio mi havas la feliĉon renkontiĝi?

— Ambaŭ vortojn vi diris korekte. Vi renkontas personon, sed la personeco estas ankaŭ nur simptomo de la naturo, precipe, se la personeco apartiĝas for de la organika materio.

— Ĉu apartiĝas? Vi parolas, kvazaŭ vi estus fantomo de mortinto! Do, ni dronos tamen en la mistikismon?

— Haha! — li diris. — Ĉu vi ne vidis elektronojn, apartiĝintajn de la atomkerno sur la ekrano de la televido? Do, sciiĝu, ke vi nun sensas min sur la ekrano de via cerbo, ĉar mia personeco — kiun vi nomas animo — povas nur tiel

sensebliĝi al la vivanta, materiala korpo.

— Do, vi tamen asertas vin fantomo?

— Jes. Mia nomo estas Camille Flammarion.

Ec la aperigo de la fantomo ne frapis min tiel forte, kiel la sinprezento. Ja, la antaŭe diritaj vortoj estis vere karakterizaj pri li.

— Ĉu la granda spiritista astronomo? — mi demandis mirege.

— Pli korekte, la pristudento de la spiritaj sciencoj, ĉar la koncepton „spiritismo” kompromitis ĉarlatanoj kaj superstiĉemaj konfuzuloj.

— Do, laŭ via opinio, la animo estas tute ordinara fizika realaĵo?

— Tute. Kaj ankaŭ via fiziko paŝo post paŝo proksimiĝas al tiu tezo, al tiu ekkono. Tago post tago evidentiĝas pri tiu aŭ alia fenomeno, ke ĝia esenco estas nekomprenebla, eĉ pli: nekonceptebla. Iom post iom vi alkutimiĝos la fakton, ke troviĝas fenomenoj, kiuj estas fizikaj, kvankam nekompreneblaj. Vi kalkulis, ĉu ne, jam de jarcentoj tute precize pri la gravitforto, kvankam ĝian esencon ni konas nuntempe malpli, ol iam ajn antaŭe kaj neniam vi konos ĝin. Sed ni parolu eble pri la celo de mia vizito.

— Do, via vizito havas ian celon?

— Vi deziris respondon de Urania al viaj demandoj. Poste vi konstatis, ke ŝi estas nura marmorpeco kaj ĉesis esperi klarigon.

— Nu? Kaj mi eble eraris?

— Ne. Ĉar vi fakte ne povus ŝin paroligi. Nur mi.

— Kiel? Ĉu vi kapablus...

— Ne forgesu: ke mi skribis ŝin. Ĉu vi ne legis?

Dummomente mi gapis senkomprene, sed subite eklumis en mia kapo, ke li havas verkon kun la sama titolo.

— Do, vi scivolas — li daŭrigis —, kien kondukas kaj kie finiĝos la scienca, teĥnika kaj socia progreso.

— Jes, mi pensadis pri tio.

— Kaj vi ricevos respondon al via demando.

Eksonis iaspeca mola, muzika tono. Sonora, mole tinta, simila al la liro. Mi devis konstati, ke la tonon donis ankaŭ la fenomeno, ĉar mi aŭdis el tiu direkto.

Malantaŭe io frapsonis. Mi turniĝis kaj jen, tie staris Urania, en sia tuta, homa grandeco, nur la terglobo kaj la bastoneto malaperis el ŝiaj manoj.

— Venu kun mi al la ĉielo — ŝi diris, senŝanĝe ridetante — malproksimen de la mondo, kaj vi povos primiri la senfinan kosmon, laŭ ĝia tuta vasteco. Jen, rigardu!

Mire mi aŭskultis la konatajn vortojn. Laŭvorte la samajn skribis Flammarion en sia libro.

— Vere, tiuj estas viaj vortoj — mi diris al Flammarion, sed kiam mi turniĝis al li, min trafis nova surprizo: li jam malaperis kaj vane mi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, tie estis nur ni: Urania kaj mi.

Sed mi ne havis tempon por cerbumi.

Urania ridete donis sian manon, kaj en la momento, kiam ŝia fingropinto tuŝis mian manon, mi perdis la pezon de mia korpo.

Mi ekŝvebis. Kaj en la sekvanta momento la ĉirkaŭantaj objektoj komencis kuntiriĝi. La plafono malsupreniĝis kaj mi ektime klinis mian kapon, sed vane: la plafono simple trairis mian kapon kaj mi sentis nenian baton. Mia kapo jam estis en la supra etaĝo, sed mi ne havis tempon ĉirkaŭrigardi, ĉar ni jam traboriĝis al la alia etaĝo.

Krome du aliajn etaĝojn traboris mia kapo kaj mi elkreskis al la libera aero. Rigardante malsupren, mi vidis, ke miaj piedoj staras senŝanĝe sur la tero, sed la pinto de mia ŝuo sur la strato jam atingis la transan trotuaron; ĝuste nun trairis la piedkarnon elektra tramvagono.

Post kelkaj sekundoj mi surprize rigardis la apudan, ĉiam ŝrumpantan terkumuleton, kiu esence estis la Gerhard-monto mem. Miajn okulojn mi nun levis al la ĉielo, kie la steloj brilis ĉiam pli klare, kiam ni iom post iom alvenis el la polvoplana urba aero. Sube brilis Danubo, kiel mallarĝa arĝenta fade-no. En ĝiaj ondoj spegulvibris la

bordaj lampoj. De malproksime montoj kuris al mi, ĉirkaŭante miajn piedojn, kaj mi komencis vidi la kurbigon de la tera horizonto.

Kaj en tiu momento fariĝis denove taglumo, ĉar mia kapo atingis la altecon, de kie mi denove povis vidi la subirintan sunon. De okcidente proksimiĝis brilaj strioj: la oceanoj, kie estis sunluma tago. Poste la tutaĵo kunfandiĝis al unu sola globsurfaco sub miaj plandoj, kiu ĉiam malgrandiĝis kaj kies unu flanko estis brila, la alia malaperis en la mallumo.

Des pli grandiĝis kaj brilis la Suno. Sed baldaŭ ĝi malsupreniris antaŭ mia vizaĝo kaj komencis denove malgrandiĝi.

Kaj tiam mi surprizite ekkaptis la manon de Urania:

Rigardu, la Granda Urso fariĝas ĉiam pli malgranda.

— Nature — ŝi ridetis. — Ĉar ni alproksimiĝas.

Mi ne komprenis.

— Tiuokaze ĝi devus grandiĝi.

— Komprenu: ni nun kreskas kaj ĉiam kreskas. Ni plukreskas la stelojn kaj tiel videblas, ke la kosmo malgrandiĝas.

Kaj mi devis vidi, ke la steloj proksimiĝas unu al la alia kaj malsuprenirante ili kunfandiĝis kaj malaperis.

Sed mi intertempe transiĝis la limon de la Galaksio. Ĝia grandega vualo kuniĝis al brilanta maso ĉirkaŭ mia talio. Kaj jam proksimiĝis aliaj galaksioj, ĉiam pli brile lumante kaj ĉiam pli ŝrumpante, ĝis fine mi vidis ĉirkaŭ mi denove nur unuopajn, brilajn stelojn. Ĉiu el tiuj steloj en si mem estis ŝrumpinta galaksio.

Kaj nun, tiuj punktiĝintaj galaksioj komencis proksimiĝi unu al la alia kaj ili denove formis pli-malpli grandajn masojn. Do, esence denove ripetiĝis la antaŭa proceso: baldaŭ mi vidis denove galaksiojn.

— Ĉu vi vidas? — ekparolis Urania. — Nun unu galaksio el tiuj estas tio, kion vi tie malsupre kredas esti la tuta mondo. Sed jen, rigardu ĉirkaŭe, vi konstatas, kiom multegaj kosmoj estas krom la via.

Kaj per tio ni nun alvenis al la duagrada mondo.

La masoj iom post iom malheliĝis, escepte de la luma globo, kiu des pli hele lumiĝis.

Kaj nun mi subite ekkonis ĉion: la kubforma objekto estas nenio alia, ol mia skribotablo kun gigantaj mezuroj kaj sur tiu iome nebulece la malfermita libro. Malantaŭe la libroŝranko, super ili la lampo. Ĉiuj ĉi senĉese malgrandiĝis kaj montris ĉiam pli difinitajn formojn. Post kelkaj momentoj mi denove estis en mia propra ĉambro. Ĉirkaŭ mi, silento. Nur la horloĝo tiktakis.

Mi gapis.

— Mi ne komprenas — mi diris al Urania. — Ni senĉese kreskis, trans la stelojn kaj galaksiojn. Kiel tamen okazis, ke fine ni venis al la sama loko, el kiu ni ekiris?

— Kiel? — ŝi respondis. — Ĉu vi ne scias, ke la mondo estas sen-

fina, sed ne senlima? Ke la spaco estas malrekta kaj rekurbiĝas al si mem?

Demandmiene mi rigardis ŝin kaj ŝi daŭrigis:

— Ĉu ne, la rekta linio senfine longigita komencas kurbiĝi. Rekurbiĝas al si mem kaj samtempe tiu ĉi unudimensia kontinuaĵo transiras al du dimensioj. Kaj same, ĉiuj dimensiohavaj kontinuaĵoj senfine grandigitaj rekurbiĝas al si mem kaj transiras al la spaco, per unu dimensio pli. Al la tri-kvar-, kvin-, kotopo dimensiaj spacoj. Do, fine, ĉu vi ne povas imagi nian nunan vojaĝon? La senfina grandiĝo de nia tridimensia korpo sammaniere rezultigis kvardimensian kontinuaĵon.

Mia cerbo komencis eklumiĝi.

— Nu — ŝi daŭrigis —, vi nun, vojaĝante en la kvara dimensio, laŭnecese revenis al via ĉambro.

— Mi jam komprenas ĉion — mi kriis entuziasme. — Nur unu klarigon mi petas de vi, ho muzo de la sciencoj. Respondu al mi: Kio estas la kaŭzo de via bonvolo, ke vi kunportis min al tiu ĉi instruplena ekskurso?

Ŝi ekridis.

— Ĉu ne vi mem estis scivola, kien alvenos la homa socio, kien kondukas la vojo de la progreso kaj kie ĝi finiĝos?

— Nu, kaj kie? Ĉu en mia ĉambro?

Ŝi rigardjetis al mi kaj denove ekridis. Sed ŝia rido iĝis pli kaj pli mallaŭta kaj samtempe komencis disflui ŝia figuro. Mi ankoraŭ aŭdis ŝian malproksimiĝantan ridon, sed poste ankaŭ tiu silentiĝis, nur la horloĝo tiktakis.

Mi rigardis al la libroŝranko. La statuo denove staris tie, ĝi ridetis senmove kaj per la bastoneto ŝi montris al la terglobo.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraj-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo


EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLATO




Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasagerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasagerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

panoram



Minareto en la urbo Eger

Leon-ornama mura puto en Visegrád, en la iama palaco de reĝo Matiaso (1458—1490)



Fine de julio en Budapeŝt kunsidis la Internacia Komitato de Arkeologia kaj Historia Muzeoj (ICOM), kiu organizaĵo estas patronata fare de UNESCO. La temo de la kunsido estis la problemoj de gardado, konservado kaj ekspozicio de tiuj arkeologiaj memoraĵoj, kiuj estas rezervitaj en sia propra loko. Oni tial elektis Hungarion, ĉar dum la lastaj jardekoj niaj arkeologiaj esploristoj precipe sur tiu tereno atingis gravan rezulton, kion ankaŭ la eksterlandanoj aprecas. Sufiĉas, se ni pensas pri la ekspozicia loko de la prahomo en vilaĝo Vértesszőlős, pri Aquincum kaj Gorsium, pri la sanktejo Isis en Szombathely, pri la tombokeloj en Pécs, pri la mezepokaj reĝaj palacoj en Esztergom kaj Visegrád, respektive pri ĉi tiuj garditaj restaĵoj.

Sesdekok japanaj diabetikaj kuracistoj estis en Budapeŝt pro studvojaĝo en la organizado de fremdultrafika entrepreno IBUSZ. La gastoj partoprenis en faka renkontiĝo en la Interna Medicina Kliniko la I.-a.

Kun la titolo „La nuntempa hungara poezio” aperis en Moskvo la unua volumo pri la hungara literaturo, la libroserio estas planita en dekkvin volumoj, elektita el la laboro de 37 hungaraj poetoj. Unu soveta fakulo de hungara literaturo en sia kritiko taksis la poemojn kaj tradukojn kaj konstatis, ke la antologio estas abunda je talentoj, arte estas profunda kaj multkoloran naci-an lirikon montras al la sovetaĵ legantoj. La poemojn interpretis tiaj eminentaj poetoj, kiel Leonid Martinov, Jevgenij Vinokurov, Rimma Kazakova, Robert Rojdestvenskij.

En la jaro 1959 fondiĝis en Aŭstrio la internacia organizaĵo „Societas Internationalis Medicinae Generalis”, kiu ĝis nun tenis siajn laborkunsidojn ĉiam en la fondiĝ-loko. Ĝi tiel decidis, ke honore al la elstara aktiveco de Hungara Scienca Asocio de Universalaj Medicinistoj, la unuan internacian kongreson ĝi aranĝos en Budapeŝt. Ĉi-somere okazis la kongreso, kiam oni pritraktis la plej gravajn medicinajn demandojn de la ĉiutaga vivo en kvindek prelegoj kaj diskutoj.

En la 1973-jara Amerika sekcio de apudborda Balatona Somera Universitato partoprenis 86 aŭskultantoj. La Amerikaj aŭskultantoj studis la situacion de kulturo kaj la lernejan sistemon de Hungario. En reprezentado de pli ol 2000 patrolandaj amatoraj astronomoj 45 fakrondaj estroj partoprenis dum tritaga interkonsilado en urbo Szolnok. La fakrondajn estrojn, konataj hejmaj fakuloj informis pri la taskoj de scienpopolarigo kaj scienca esplorado. La hungaraj amatoraj astronomoj unuavice per observado de la tielnomataj ŝanĝigantaj steloj, per registrado de aktiveco de sunmakuloj kaj lunaj fenomenoj helpas la laboron de la profesiaj astronomoj.

Dum la ĉi-jara somero en la VII. Internacia Bartók-seminario en reprezentado de 17 landoj — novaj partoprenantoj Irano, Ĉilo, Hispanio, — partoprenis 29 violon-solistoj kaj 10 arĉkvartetoj. La estiĝon de Bartók-seminario dominis tiu penso, ke por la nuna muzikpedagogo kaj deklamisto estu konata la absolute aŭtenta interpretado de la Bartóka verkaro. Donas grandan helpon, ke ankoraŭ vivas la senperaj kunlaborantoj de la granda komponisto, kiuj povas transdoni siajn proprajn spertojn al la nuntempa generacio.

La estraro de la Mondligo de Hungaroj kaj la Konferenco de Gepatra Lingvo, dum la pasinta somero duafoje gastigis en la antikva studenturbo Sáropatak unuavice en la anglalingva teritorio (en Ameriko kaj Kanado) vivantajn infanojn de hungaraj gepatroj. La pasintjara pli modesta-nombra kurso havis tian sukceson, ke ĉijare jam 38 mezlernejaj studentoj venis al Sáropatak. En la kvinsemajna kurso, la anglan lingvon eminente parolantaj hungaraj profesoroj instruis la lernantojn pri hungara lingvo kaj prelegis pri hungara literaturo, historio, geografio kaj pri la etnografiaj specialaĵoj. Dum ekskursoj ili interkonatiĝis kun tiuj vilaĝoj el kiuj iliaj prageavoj kaj geavoj elmigris en la komenco de nuna jarcento, aŭ inter la du mondmilitoj. Dum la landirado ili povis interkonatiĝi kun la pli grandaj regionoj kaj urboj de nia lando.

panoramo

En Hungario estas redaktata la angla-lingva kvaronjara revuo. New Hungarian Quarterly, aperiginta antaŭ nelonge sian kvindekan numeron. En la anglalingva teritorio gravan rangon atingis la revuo, kaj nun ties ĉefredaktoro ekde la fondo, Iván Boldizsár en sia solena salut-artikolo konstatis: ekde aŭtuno de la jaro 1960, kiam aperis la unua volumo, la plej ĉefa celo kaj tasko estis la prezentado de la literaturo, la vivo de la hungaraj homoj, la hungara socio kaj ĉefe la ŝanĝoj en ili. La malnova amiko de la revuo kaj nia lando C.P. Snow en la analiza artikolo skribis: „Nenia dubo povas esti pri tio, ke N.H.Q. multe pli bonan kaj samtempe pli interesan bildon montras por la anglalingva leganto pri Hungario kaj pri la hungara literaturo, ol kion ni ricevas pri ia ajn alia lando. Tio simple signifas, ke N.H.Q., konsidere al sia artospeco kaj celo, estas unu el la plej bona eldonaĵo de la mondo, kiel tion ni povas konstati.”

En 1974 Hungario organizos 53 eksterlandajn ekspoziciojn; ĝi partoprenos en 48 internaciaj foiroj, duloke oni organizos memstaran nacian ekspozicion, en tri landoj la tielnomatan hungaran semajnon.

La Internacia Biokemia Unio en Stokholmo aranĝis kongreson, kie akademiano F. Bruno Straub, la ĉefdirektorono de Biologia Centro en Szeged, oni elektis vicprezidanto de la Unio.

Satataj estas la hungaraj hundopecoj preskaŭ en ĉiu parto de la mondo, unuavice la ĉashundo „vizsla” kaj „puli”. (Vd. H.V. 1968/1.) Krom la eŭropaj ĉasistoj, ankaŭ la nordamerikanoj, peruanoj, venezuelanoj, sudafrikanoj aĉetas la hungarajn hundojn, nuntempe la japanaj hundobredistoj ankaŭ montras intereson.

Por la ĉijara librosemajno aperis la unuaj du volumoj de la serio „Hungaraj klasikuloj”, ĉiuj verkoj de Mihály Vitéz Csokonai. Tio estas granda kaj bela entrepreno de la hungara libroeldonado; dum dek-dekdu jaroj,

jare meznombro en kvin volumoj, laŭ volumoj po 1200—1600 paĝoj, presitaj sur maldika „biblia” papero, kune prezentas la serio la plej elstarajn verkojn de la hungara literaturo.

La Hungar Hotels ĉi-jare malfermis jam la kvinan restoracion eksterlande. En Kopenhago, en la dana ĉefurbo, en senpera najbareco al la magistrata domo oni establis la „Budapest Restaurant”, kiu kun hungara personaro kaj orkestro funkcias. Apud la restoracio oni malfermis ankaŭ hungaran donacbutikon.

Satataj estas la hungaraj manĝmaterialoj en Francio. Antaŭ kelkaj jaroj oni aranĝis la unuan nutrajindustrian semajnon, kie la hungara salamo kaj kolbaso havis grandan sukceson. Ekde tiu tempo la eksporto de viandmaterialoj kreskis je duobla kvanto en Francio. En la urbo Strassbourg, en la prilabora fabriko el 220 tunoj da hungara ansera hepataĵo fariĝis ĉi-jare la mondkonata, fama konservaĵo de ansera hepataĵo.

Hungara artistgrupo gajnis la unuan premion de la ĉijara folklorfestivalo en Karthago.

En la Budapeŝta teatro Thalia, la reĝisoro Károly Kazimir, pri kies kuraĝaj entreprenoj jam temis en la antaŭa numero, surscenigis la turkan popolan farson „Karagöz”. La supra bildo montras scenon el ĝi.

Sceno el la turka farso „Karagöz” en la prezentado de la Budapeŝta teatro Thalia

*Al ĉiuj niaj legantoj kaj
esperantistoj ni deziras sincere
agrablan kristnaskon
kaj bonan novjaron!
Bonan sanon kaj multajn
sukcesojn!*

Hungara Vivo

Kiu scias hungare?

LA MONDO ESTAS MALGRANDA!

En la partero de la hotelo Pekino en Moskva mi staras antaŭ la pordo de la lifto. Mi premis la vokbutonon, mi atendas la aŭtomatan lifton. Apud mi estas negro. La lifto alvenas, mi malfermas la pordon kaj ĝentile volus lasi iri la negron antaŭ min, mi diras al li „pajalujsta” (bonvolu!) kaj montras al li, ke li eniru. Sed li nur staras. Ankaŭ li estas ĝentila. Ankaŭ li diras ruse, ke bonvolu, kaj montras, ke mi iru. Ankaŭ mi ne moviĝas, ankoraŭfoje mi diras, ke bonvolu, je kio ankaŭ li diras, ke nur bonvolu, je kio mi ripete diras, ke nur bonvolu. Dum du minutoj ni nur staras, stamfetadas kaj ĝentiladas kaj alterne ripetas la vorton „bonvolu” kaj kiam mi jam ne povas plu elteni, mi suprenrigardas al la du metrojn alta junulo kaj hungare eksplodas: Je dio! do enpaŝu! — Subite sereniĝas la vizaĝo de la negro: — Ĉu vi estas hungaro? Kial vi ne diris tion? En Budapeŝto mi lernis kvar jarojn en la universitato... Nu, ni iru. Ni iras. Gaje skuiĝadas la lifto.

KION FLARAS LA HUNDO?

Domo de diplomatoj en Moskvo. Mi iras en la koridoro. Ĉi tie oni ne scias, kiu kiun lingvon parolas, ĉi tie loĝas francoj, germanoj, jugoslavo, angloj, finnoj, ĉiuj nacioj de la mondo. La koridoro estas malplena, mi rigardas la nomtabulojn sur la pordoj, mi serĉas iun loĝanton. Subite venas kontraŭ mi damo kun peltaĵo, kun belega luphundo, la hundo haltas apud mi, ĝi amikadas kun mi. La damo kun la peltaĵo ektiras la kondukilon kaj hungare parolas al la hundo: — Tuj vi ricevos vangofrapon, vi ne devas ĉirkaŭlekadi ĉiun fetoran homon! — Mi levas mian peltan ĉapon: Mi kisas vian manon, ĉu vi ne scias, kie loĝas gesinjoroj Kovács?

ĈU VI PAROLAS ANGLE?

Restoracio Ukrainio. Estas granda la fremdultrafiko. Ĉiuj tabloj estas okupitaj. Ĉe iu tablo sidas nur unu viro. Mi paŝas tien. „Ĉu permesate sidiĝi?” — mi demandas ruse. La viro ne respondas, nur montras al la seĝo. Mi sidiĝas. Ni sidas, sidas mute. Mi dezirus paroli — Ĉu vi parolas ruse? — mi demandas. Li rigardas al mi, skuas sian kapon. Poste li: — Ĉu vi parolas france? Mi skuas la kapon. Poste mi: — Ĉu vi parolas germane? Kapskuado. Poste li: — Ĉu vi parolas angle? Nun denove mi skuas la kapon. Ni disetendas niajn brakojn, estas malespere, la interparolado ne povas okazi, mute ni manĝas niajn vespermanĝojn. La sekvan tagon ni renkontiĝas en la hungara ambasadorejo en Moskvo: li estas kunlaboranto de iu budapeŝta semajna gazeto.

MALGRANDA INTIMAĴO

Magazenvico de Suzdal, urbo de artobjektoj, ducent kvindek kilometrojn de Moskvo. En iu magazeno estas ricevebla granda vico da specialaj popolaj lignoskulptaĵoj. La vicostarantoj estas senpaciencaj, malrapide moviĝas la homserpento — ĉe la butiktablo maljuna virino longe, komplikite elektadas. El la vicostarantoj hungara viro laŭte ekparolas al sia kompano staranta apud li: — Kial tiom elektadas tiu surda kokino! Je kio ŝi retorigardas kaj diras hungare: Vi povus esti dirinta almenaŭ kokineton!

Tradukis: L. TÁRKONY

„INFORMATION HUNGARY”

Jen bela libro 1100-paĝa, leginda de niaj ĉiulandaj amikoj, kiuj komprenas la anglan lingvon. Ĝi aperis en komuna eldono de la Pergamon Press en Oxford kaj de la hungara Akademia Eldonejo kaj havis tian sukceson, ke oni jam interesiĝas pri eldono en la germana kaj rusa lingvoj. Ĉu ne valorus eldono ankaŭ en Esperanto?

Oni povas el ĝi konatiĝi kun la ekonomia vivo, kun la evoluo de la higieno kaj sanitaro, kultura progreso, sciencaj rezultoj. Multaj fotoj kaj reprodukcioj montras varie la historion de la hungara literaturo, teatra, filma kaj muzika kaj belarta kulturo.

Riĉa estas la ĉapitro pri la internaciaj rilatoj, pri la turismo en Hungarlando kaj pri la hotel- kaj restoracio-industrio.

Laŭ la enkonduka ĉapitro ni ekscias, ke la ĉefa celo estis doni laŭeble plenan bildon pri la Hungara Popolrespubliko kun detala konigo de la historio de la lando. Ja la vivo de lando kaj popolo ne estas mezurebla sen kono de ties historia sorto kaj de ties evoluo.

Eble estas menciinde, ke la iniciatinto de la eldono estis angla laborist-partia parlamentano Robert Maxwell, tiam posedanto de la Oxforda eldonejo. Li naskiĝis en Karpata-Ukrainio, studis en Ĉeĥoslovakio, bone parolas ruse kaj hungare. Dum la dua mondmilito, kiel ĉeĥoslovaka militpiloto li transportis sian aviadilon — kun sia tuta flugvarmo — al Britlando kaj en ties defendo batalis kontraŭ Hitler. Post la milito li fariĝis tie parlamentano kaj volis, kiel eldonisto, servi sian iaman patrujon. Tiel li komencis eldoni serion „La landoj de la mondo”. En tiu serio aperis ĉi tiu libro kunlabore de la redakta komisiono de la Hungara Scienca Akademio.

P. BALKÁNYI



Agrablan vojaĝon deziras al Vi
en la nova jaro


MALEV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

Hungara Aertrafika Entrepreno

Esperanto kaj la muziko

Ofte oni diras: la vera internacia lingvo estas la muziko.

Ĉi tiu eldiro estas memkompreneble sole parabolo: la muziko ne povas sciigi pri konceptoj, nocioj ktp. Ĝi ne estas simpla komunikilo, sed arto, kiu havas specialan kaj gravan rolon en la vivo de l'homo — de la socio; tute alian rolon ol la lingvo.

Tamen — Esperanto kaj la muziko havas certajn komunajn trajtojn kaj interligilojn. El ĉi tiu fakto elirante fondis esperantistoj organizacion, kies celo estas fortigi la Esperanto-movadon per muziko kaj levi la nivelon de la progresita muzikkulturo inter la samideanoj per helpo de Esperanto.

Esperantistaj muzikfakuloj jam en la jaro 1963 fondis do organizacion sub la nomo MUZIKA ESPERANTA LIGO (MEL), kiu anoncis sin unue en la 34-a Itala Kongreso de Esperanto. La ĉefaj iniciatoroj de MEL estis Gio. Batta Briano el Ĝenovo kaj Mario Dazzini el Massa (ambaŭ el Italio). Baldaŭ aliĝis aliaj muzikaj ekspertoj-samideanoj.

Ekde ĉi tiu dato pasis jam jardeko. intertempe MEL fariĝis pli internacia. El multaj landoj aliĝis al ĝi samideanoj-muzikistoj pliriĉigante ne nur la movadon de la internacia lingvo, sed samtempe kreante bonan apogilon por atingi pluran evoluon de la muzika kulturo de Esperantujo.

En la jaro 1966 MEL fariĝis Kunlaboranta Faka Organizaĵo de UEA kaj en 1967 naskiĝis la Muzik-Terminara Komisiono, kiu plenumas gravan rolon kaj bezonon: difini la muzikajn fakesprimojn esperantlingve kaj per ĉi tio krei eblon por doni fake kaj lingve perfektajn prelegojn kaj skribajn artikolojn pri muzikaj temoj — en Esperanto.

La plej unua valora frukto de la agado de MEL estas la *Esperanto-Lingva Muzika Leksikono* de s-ano Briano. Jen la komenco de l'ĉesigo de la plej ĉefa manko en la muzika vivo de la Esperanto-movado: havi konvenajn esperantlingvajn fakvortojn en la tereno de la muziko.

Kompreneble, la Muzika Terminara Komisiono (MTK) interkomunikiĝas kun la Terminologia Centro de ISAE (Internacia Scienca Asocia Esperantista). Gvidanto de la Terminara Komisiono estas s-ano Georg Chr. Sack (Heidelberg) kiu senlace kaj fervore laboras por atingi la gravan celon de la Komisiono.

Sendube estas necese ĉiam kaj senhalte levi la muzikan kulturon in-

ter esperantistoj. Ĉi tio estas atingebla per konstanta plibonigo de la laboro de MEL.

Kiamaniere povas MEL utiligi sian laboron kaj agadon por la bono de Esperanto? Per ĉiutagaj klopodoj. Ekzemple: dum la plejmulto de Esperanto-kongresoj kaj konferencoj, kunvenoj aŭ Someraj Universitatoj eksonas kantoj, arioj, partoj de mondfamaj operoj ktp. Grava tasko de MEL estas zorgi pri tio, ke taŭgaj traduktoj estu ellaborataj por ili kaj disponeblaj por ĉiu, kiu volas esperantlingve kanti.

Sajnas necesa fondi apartan sekcion de MEL por nefakuloj-muzikamantoj. Ili certe povas havi multe da avantaĝo, se ili aliĝas el MEL. Estas multaj esperantistoj, kiuj volas ne nur aŭskulti muzikon, sed krom tio scii pli multe pri ĉi tiu arto. MEL estas la forumo, al kiu ĉiu interese-mulo povas turni sin kun siaj demandoj kaj la muzikaj ekspertoj de MEL volonte donos al ili klarigojn koncerne iliajn muzikajn problemojn.

Ofte okazas, ke aranĝantoj de kunvenoj esperantistaj ne scias, kiamaniere pliprofundigi kaj ornami la programojn per muziko. Ankaŭ en ĉi tiu okazo ili povas nepre fidi je la helpo de MEL.

Ankaŭ en esperantlingvaj gazetoj de tempo al tempo aperas artikoloj pri muzikaj temoj. Por gardi la fakan fidindecon kaj samtempe la lingvan ĝustecon estus rekomendinde akcepti la helpon de MEL, kies membroj volonte tralegas kaj prijuĝas ĉiun artikolon aŭ tekston, kiu koncernas muzikon kaj volas aparteni al la trezoro de la lingvo Esperanto.

Ni fidas je la helpo kaj apogo de la ne-ekspertoj, kiuj estas muzikamantoj. Iliaj proponoj kaj konsiloj estos ĉiam dankeme akceptataj. Pro tio ĉi tiuj simpatiuloj estas petataj sendi iliajn rimarkojn al la adreso de la Redakta Komisiono. Ilia helpo estos certe fruktodona por la plua laboro de MEL.

D-ro Lajos LESZNAI

Anatomio de la grasiĝo

— *La vidvino de Andrés Rieger mortis antaŭ unu semajno, frumatene. Si pezis centdudek kilogramojn! Mi konis ŝin, ni laboris kune preskaŭ tridek jarojn. Kortuŝite mi funebras ŝin. Stranga estis ŝia vivo, kaj stranga ŝia morto. Si mortigis sin mem...*

— *Kiam en 1940 ŝi eklaboris en la paperfabriko, ŝi estis bela, svelta virino, ĉiam ridetanta. Vespere kutimis veni ŝia edzo por atendi ŝin. Brak'en brak' ili iris hejmen. Ho, kiomfoje mi postrigardis ilin, kaj enviis de ili la Junecon, la amon. La okuloj de la paro brilis, la korpoj kunpremiĝis, kiel ĉe geedzoj dum la unuaj tagoj, malgraŭ ke ili estis geedzoj jam de kvin jaroj, havante kvarjaran filineton. En la fabriko dum ĉiu paŭzeto ŝi parolis nur pri la filineto. Tagmeze ŝi manĝis ĉiam nur grasitan panon. Tiel ne eblas vivi, mi diris al ŝi, vi ruiniĝos tiamaniere. Sed ŝi ridis: dum duonjaro tio estas eltenbla, la mono estas bezonata por aĉeti novan meblaron, la eta loĝejo iĝos ĉarma, tial indas ŝpari. La 4-an de Julio 1943 ili aĉetis la novan meblaron, al inaŭguro de la loĝejo ili invitis ankaŭ min. Mi alportis vinon, oni festenis, ili sentis sin feliĉaj...*

— *La 4-an de Decembro 1943 la edzo estis urĝe vokita en la armeon, oni direktis lin al militfronto, tie li mortis. En Septembro 1944 — dum ŝi laboris en la fabriko — la loĝejon trafis bombo, forbrulis la meblaro, la tapiŝo, ĉio, kion ŝi aĉetis, pro kio ŝi manĝis nuran grasitan panon, kaj mortbrulis ankaŭ la filineto. Eĉ ŝia kadavro ne estis trovebla.*

— *La vidvino restis tute sola, havis jam nenion kaj neniun. Senvoĉe ŝi vivis inter ni, kiuj vane provis ŝin konsoli, helpi, ĉar ŝi rifuzis ĉion-ĉi. Homojn evitante ŝi malmulte parolis, loĝis en luita ĉambro, havis nur du robojn, pli ŝi ne volis, nek novan loĝejon. Jam nenion ŝi deziris... Nur manĝis. Terure ŝi manĝis. La tutan salajron formanĝis. Se ni menciis tion, ŝi neglekteme reagis: La manĝitan jam neniun povos forpreni, ja, neniun... La manĝado iĝis ŝia vivo, ŝia ekzistado. Kaj tiel ŝi vivis dudek jarojn. Iam ŝi pezis 60 kilogramojn, nun surhavis 120 kilogramojn. Manĝego. Vorado. Si ofte malsaniĝis. La kuracisto avertis ŝin, ne tiom multe manĝi. Si simple flankenlasis tion. Tial ŝi mortis. La koro trograsiĝis kaj haltis.*

Trad. Ervin Fenyvesi
LAJOS H. BARTA

„Se mi estos ambasadoro en Turkio”

La titolo citita frazo signifas en la Budapeŝta slango ion absolute neatendeblan, absurde maleblan. Nu, ĝi tamen efektiviĝis en la vivo de iama hungara lingnajisto. Li estas *Imre Kutas*, nun sesdekse-jara emerita diplomato kaj vicprezidanto de la Hungara E-a Societo.

Mi ekkonis lin en la laborista movado antaŭ la liberiĝo. Kiel lingnajisto li estis ekde 1921 membro de la lingnajista sindikato, poste ekde 1922 li aliĝis ankaŭ al la subtera komunista partio. Mi estis tiam peltista junlaboristo kaj en la partia laboro ni interamikiĝis. Li aktivis ankaŭ ĉe la laboristaj esperantistoj kaj ĉe la laborista sport-asocio. Ĉe niaj renkontiĝoj ni multe diskutis kaj politikis, fidis kaj malfidis laŭ la okaza animstato. Estis tempoj dum la dua mondmilito, kiam estis malfacile ne vidi la futuron malcerta kaj la liberiĝon pli ol revo dorlotata. Estas do kompreneble, ke kiam mi konfesis al li mian sekretan „manion”: fariĝi ĵurnalistoj post la realiĝo de la revo, li diris realisme:

— Provizore mi ĝojus, se mi transvivus la faŝismon kaj la militon kaj mi havus konstantan laboron...

Mia amiko nome pli frue konis la senlaborecon ol mi. Jam en 1926 li prenis migrulan bastonon kaj helpe de laboristo-esperantistoj li akiris laboron en Luksemburgo. Ankaŭ tie li aktivis komuniste kaj lernadis germane. Apenaŭ unu jaron li laboris tie, kiam lia uzina ĉefo lin atentigis, ke pro lia politika agado oni elpelos lin el Luksemburgo kaj neniam li rajtos reveni tiun landon. Do li eĉ ne ĝisatendis la elpelon.

La duan fojon li venis eksterlanden en 1929. Unu el la ĉefaj gvidantoj de la subtera komunista partio de Hungario, Sándor Fürst, kiu poste mortis martiran morton, sendis lin al plursemajna partilerneja instruigo en Vienon.

En la postaj jaroj li travivis ĉion malbonan, kion travivis la plimulto de la ĉi-landaj komunistoj al li similaj.

Post la liberiĝo ni ambaŭ estis multaspece okupitaj, do nur malofte renkontiĝis. Mi sciis pri li, ke en 1945 ankaŭ lin, kiel politike instruitan laboriston, oni alvokis sidiĝi apud skribotablo, sed prefere li estus restinta ĉe la rabotostablo. Tamen tiam estis problemo de ekzisto por la nova ŝtatorganizaĵo de la laborista potenco entiri por plua lernado kaj por posta ofidado laboristojn kapablajn kaj talentajn. Tial do en 1950 li venis en eksterland-aferan servadon. Li lernis la francan lingvon kaj en 1953 oni konfidis al li la gvidon de nia svislanda legacio.

De tiam nur el la ĵurnaloj mi sciigis pri liaj diversaj diplomaciaj postenoj: li gvidis nian Franclandan, poste Belgian kaj Luksemburgan legaciojn. Poste venis la afero pri kio aludas la titolo: li fariĝis nia ambasadoro en Turkio, kaj kiel tia li servis sep jarojn en ties ĉefurbo, Ankaro.

Antaŭ nelonge ni renkontiĝis en koridoro de medicina konsultinstituto, kaj, kiel konatoj delonge nevidantaj unu la alian, kun granda ĝojo ni nin salutis

reciproke. Tiam mi demandis lin, ĉu dum siaj traktadoj kun kronitaj kapoj li memoris ankoraŭ pri la malnova revolucia kanto, kies komencaj vortoj estas „Reĝoj, princoj, grafoj...”

— Kion vi pensas — li redemandis —, kio venis en mian kapon, kiam mi transdonis en Luksemburgo mian diplomatan mandaton al grandprincino Charlotte? Mi pensis, kion do nun dirus mia iama ĉefo, se li sciigis, ke tamen mi envenis Luksemburgon kaj eĉ tiel neforpeleble de polico?!...

— Kiam mi prezentis min al Bech, eksterlandafera ministro de Luksemburgo — li rakontis plu —, mi trovis lin tre konversaciema, nome li sciis multe pri nia pentristo Mihály Munkácsy, kiu vivis kaj kreis ankaŭ en Luksemburgo. Ĝoje mi parolis al li pri nia granda pentristo, kies bildojn mi tre bone konas, ne nur el mia ĝenerala ŝato de la belartoj, sed ankaŭ, se tiel diri, el metia solidareco, Munkácsy nome komencis, simile al mi, kiel lingnajisto.

Mi demandadis lin plu pri liaj interesaj memoraĵoj. Li rimarkis kun ŝerca seriozo, ke eĉ emerita diplomato ne povas babili antaŭ ĵurnalistoj, „ĉar vi ĉion trograndigas”. Tamen li rakontis, ke oni konfidis lin per la gvido de nia legacio en Belgio en la tempo de la Brusela mondekspozicio.

— Tiam nian legacion tie la renomaj personoj de la Belgia publika vivo superŝutis per ĉarmaj petoj: ili serĉis nian protekton por ricevi tablon en la restoracio de la hungara pavilono. Ĝi estis nome unu el la plej ŝatataj lokoj de la mondekspozicio. Tiel mi devis okupiĝi ankaŭ pri tia „gastronomia diplomatio”.

— Kiel reprezentanto de mia lando en Parizo, ankaŭ mi aperis ĉe la kutima novjara akcepto de Coty, tiutempa respublika prezidento. Kiam mi aliris lin kun miaj bondeziroj, li min salutis jene kun ŝerca bonhumoro: „Sinjoro sendito, ĵus mi trinkis el via admirinda vino Tokaja kaj ĝi havis je mi tian efikon, ke nun mi estas preta ion ajn al vi subskribi”.

Mi devis venki lian modestecon, por ke li parolu pri tio, ke dum lia ambasadora funkciado en Ankaro li sukcesis realigi malnovan hungaran deziron: fine ni povis malfermi hungaran memor-muzeon en Rodosto, en la elmigra hejmo de Ferenc Rákóczi. La muzeon inaŭguris János Péter, nia ministro pri eksterlandaj aferoj.

— Kiam oni nomis min ambasadoro en Turkio — li diris post la medicina konsulto —, plurfoje mi pensis pri vi.

— Kial? — mi demandis mire.

— Tiutempe mi legadis viajn riportojn kaj tio memorigis al mi aferon, pri kiu vi jam certe ne memoras. En la malnovaj malbonaj tempoj vi ĉiam revadis esti iam ĵurnalistoj kaj foje, kiam min tedis jam via obstino, mi diris al vi: „tiam vi fariĝos ĵurnalistoj, kiam mi ambasadoro en Turkio”. Nu, mi devis konstati, ke mi eraris: vi fariĝis pli frue ĵurnalistoj, ol mi ambasadoro en Turkio”.

Tradukis: L. TÁRKONY

Orienta kolektaĵo de Hungara Scienca Akademio

La biblioteko de Hungara Scienca Akademio havas orientan kolektaĵon, kiu ankaŭ tutmonde estas rimarkinda. Oni gardas tie 140 arabajn kodeksojn kaj manuskriptojn. La persa kolektaĵo konsistas el 130, kaj estas 600 la nombro de turkaj manuskriptoj kaj kodeksoj. Ĉiu kolektaĵo estas po unu vivo-verko. Ekzemple por la hebrea kolektaĵo Dávid KAUFFMAN oferis sian tutan vivon. Lian nomon portas la 600 hebreaĵoj kaj manuskriptoj kaj ankaŭ la 670 fragmentoj Genezaj. La plej valorajn ekzemplerojn de 350 mongolaj manuskriptoj kaj lignopresaĵoj alportis akademiano Lajos LIGETI el sia Intern-Azia esplorvojaĝo! Estas ankaŭ valoraj la 40 manĉuaj kaj 1500 tibetaj manuskriptoj kaj lignopresaĵoj.

Kelkaj el tiuj manuskriptoj kaj kodeksoj havas apartan historion, diras la estro de la kolektaĵo Lajos BESE, sub kies redaktado nun pretiĝas angla-lingva katalogo de la orienta kolektaĵo. La kolektaĵo el Tibeto kiun uzis Sándor KÖRÖSI CSOMA konsistas el 36 pecoj. Prezentas grandan valoron la kvarvoluma Mosnatorao, kiu estas klariga eldono de la kvin libroj de Moseo. La interesecon de ĝiaj ilustraĵoj kaŭzas la fakto, ke ili respegulas la efikon de la tiutempaj kristanaj kodeks-farejoj.

Pri la bibliotekoj de la malnov-epoka Oriento ni scias nur malmulte. Ĝuste pro tio havas eksterordinaran valoron la katalogo de biblioteko de la turka sultano II. BAJEZID, kiu enhavas liston de plurcent libroj.

Tr. L. RIETH

Sukcesoj de la hungara ceramiko

La Italia urbo *Faenza* estas kvazaŭ Mekko por ceramikistoj. Dum la ĉiujare aranĝata „Concorso internazionale della ceramica d'arte contemporanea” — t.e. okaze de internacia konkurso de arta ceramiko — oni vicigas la partoprenantojn en plurajn kategoriojn, kaj disdonas premiojn aparte en ĉiuj kategorioj.

Okaze de la ĉijara XXXI-a „concorso” ni gajnis du premiojn: en la unua kategorio — en la konkurso de la artaj ceramikaĵoj — ceramikistino Ilona BENKŐ ricevis „ormedalon de la internacia ceramiko-konkurso de Faenza”; kaj László HORVÁTH en la dua kategorio — industriaj produktaĵoj — akiris „ormedalon de provinco Emilia Romagna”. Antaŭ du jaroj alia hungaro Imre SCHRAMMEL ricevis ankaŭ ĉefpremion pro siaj verkoj.

Tiuj rezultoj signas, ke la hungara ceramiko liberigis sin de la ĝisnue ripetata konservativismo, kaj tiu novo atingis rekonon ankaŭ okaze de la konkurso de la plej eminentaj ceramikistoj de la mondo.

Tr. L. RIETH

Ernő Holló (* 1910), rumaniano-hungaro. Ĝis nun aperis de li ok poemlibroj. La poemoj estas prenitaj el la antologio de rumaniaj-hungaraj poetoj „Posdegstariganto”, eldonita de kultura komisiono de Domo de Popolaj Kreaĵoj en Kovasna, Rumanio.

ERNŐ HOLLÓ*

ANSEROJ

*Je ia krio, ĉaro-bruo, bleko
de aŭtoĥupo, je ia eksono
niaorele nekaptebla, je fora
voĉo alvoka,
ili flugilojn siajn disetendas
duflanken kiel aviadil-alojn
aŭ remil-paron neĝo-blankan, kaj
kun stentora gi-ga-ga-ekzaltiĝo
ekvojas plugi tra l'
nemezurebla maro de l'ĉielo.*

*Nur kvin-ses paŝojn longas kurs' ekkura,
entute tiom estas lukto ilia,
la senespera, blinda, vana
renkontiĝemo
kun nubo, kosmo, infinito.*

*Kelkpaŝa 'stas la voĉo: flugi, ek!
Kaj l'adiaŭ reciproka kun
la herboj, stratoj, vilaĝfinoj, akvoj, —
poste la paŝo mortas en sin mem.*

*La tuto 'stas jam ne pli ol mallerta
klopodo, kiel la kriĉad' sensona de l'
patrino infan-senigita, aŭ tremo
de la hirundo inter
la ungoj de aglo,
ke dezir' ilia estas morta
kaj la piedoj
gluiĝas teren.*

VIZAĜO SURSTRATE

*Vizaĝo,
dura, fermita, kion vi portas? Kiel
profunde kaŝas vi la kareson por
viaj infanoj, la kliniĝadojn
ŝutitajn en okulojn de l'ĉefo, brakumon
de l'amatino, fuŝitan
tolon, sukcesan globolagron, eraran
rubrikaĵon magazen-libran, vinon
vesperan, vin kanti kapbalancigantan, mokon
de l'edzino, ke: nu jes, aliaj lukrás pli. Kaj kiel
avare vi gardas viajn bagatelaĵojn, kiuj
'stas tiel same viaj kiel
via stomak-ulcero kaj kor-reŭmatismo.
Silento estas en vi kaj post vi kaj
antaŭ vi, kvazaŭ
neniun vi havas en la mondo, kvankam
vi havas fraton, familion, parencon,
kiuj same en vi enestas kiel
viaj aĵoj time gardataj en tirkestoj.
Vi havas amikon pensatan kun manpremo,
malamikon, kun kiu vi pretas interpugni.
Se mi vin haltigus: kion vi portas?
Ĉu vi min brakumus aŭ
kaptus min je la kolo?*

Tr. K. KALOCSAY

MARGIT KOVÁCS

Dum la pasinta somero oni inaŭguris novan muzeon de Szentendre, en ĉarma urbeto proksime de Budapeŝto. La ĉambrojn kaj halojn plenigas tre originalaj, sugestaj ceramik-skulptoj. Ilin ĉiujn kreis unu artisto, Margit Kovács, kiu en ĉi tiu jaro estiĝis 70-jara. En la mondo estas ne ĉiutaga okazaĵo, ke la ŝtato honoras ankoraŭ vivantan artiston donante al ŝiaj artobjektoj apartan muzeon. Si estas tia esceptulino.

Sia arto meritas tute eksterordinaran lokon kaj rangon en la hodiaŭa hungara artvivo. Kiu do ŝi estas? Skulptisto? Ceramikisto? Popolar-
tisto? La respondo estas facila kaj malfacila, ĉar ŝi estas ĉiu el tiuj: ceramikisto, skulptisto, popol-
artista. Sia memor- kaj travivaĵmondo estas ŝia infanaĝo, la riĉa hungara popolarto, sed ankaŭ la mitologio, la mondo de Biblio. La materialo el kiu ŝi laboras, estas la argilo: ŝi formas ĝin unue sur rado kaj poste per siaj fingroj, kaj poste bru-
ligas, kolorigas ĉiujn pecojn. Tiel naskiĝas la fi-
guroj, kiujn hungaroj kaj eksterlandanoj tre ŝa-
tiuajn trovi.



Por karakterizi iomete ŝian artmondon, ni vidu la titolojn de ŝiaj ceramik-skulptoj: Danco de Salome; Foriris du knabinoj; La lasta vespermanĝo; Vivo-morto; Cantana profana; Tri reĝoj; Geedziĝa festo de kamparanoj; Suzana; Hommage a'Szentendre; Patrino kaj ŝia filino; Davido; Naskiĝo; Geedzeco; Morto; Fiŝkaptisto; Funebro; Teatro; Mia patrino; Nigra aglo; Kolombo.

Jam kiel juna artistino ŝi ricevis la unuan grandan honoron en 1937, en la mondekspozicio en Parizo, kiam oni ŝin premiis per Diplome d'Honneur. Poste sekvis la Kossuth-premio en 1948, kaj en la 1958-a mondekspozicio en Bruselo: la Grand Prix. Si estas Eminentia Artisto de la Hungara Popolrespubliko.

MIHÁLY GERGELY

REVUO DE REVUOJ

En ESPERANTO de UEA (nro 6.) ni povas legi pri la funkciado de la UEA-estraro en Rotterdam. Estas ĝojige, ke, laŭ la artikolo, grave kreskos la eldona aktiveco de la Asocio. Bedaŭrinde la inflacio kaŭzas multajn malfacilaĵojn malgraŭ la salutinda altiĝo de la membronombro. Oni ofte malpacienas, eĉ preskaŭ malesperas pro la nesufiĉa progreso de la disvastiĝo de E-o kaj pro ĝia malfruiĝanta triumfo. Sed oni forgesas, ke el la vivotempo de E-o dek jarojn rabis la du mondmilitoj, malfavoris ĝin la t.n. malvarma milito kaj nun ĝin endanĝerigas la inflacio, pro kiu oni ne povas jubili eĉ pri tio, ke la Kapitalo Hodler 68 transpasis 150 000 guldenojn.

LITERATURA FOIRO faras laŭdindajn fortostreĉojn por sia ĝisdatiĝo kaj ŝajne ĉi-jare ĝi sukcesos pri tio. En la lasta numero (nro 17—18.) plezure estas legi la eminenta spritajn kaj trafajn aforismojn de S. J. Lec en la traduko de J. Banacki, la recenzon de H. Tonkin pri la Somermezokta Sonĝo trad. de Kalocsay, kaj la artikolon de G.L. Gimelli pri la misteraj etruskoj (bedaŭrinde ankaŭ li ne solvas ilian misteron). Mi opinias, ke en la nomoj Erodotos, Oratius, Alikarnassus mankas la komenca „h”. La artikolon de Szerdahelyi pri interlingvistiko mi tuŝetis nur kun la pia timo de laiko. Kaj mi nepre ne forgesu pri la intim-efektaj poemoj de Nicolino Rossi.

KULTURAJ KAJEROJ estus nomebla kvazaŭ oficiala gazeto de la esperantista kulturdomo Kastelo Grésillon en la franclanda Baugé; tie oni povas ne nur ripozi, gaje libertempoj kaj ekskursadi, sed ankaŭ perfektigi sin en E-o kaj aŭdi prelegojn diverstemajn. La gazeto mem estas bone redaktita, ekzemple ĉi-numere vi povas legi pri Molière, karnovoraj plantoj, megalitaj monumentoj, mezepokaj libertempoj. Per tri satiroj kontribuis L. Tihanyi. Unuapaĝe legeblas versoj „Legendoj pri Grésillon”. Ĉi ties pipre pikanta enhavo suspektigas, ke eble la sampaĝe legebla esprimo „la litoj estas malmultaj” ne estas preseraro.

En PACO, oficiala organo de MEM, franca-belgabruta eldono (2. 1973) frontpaĝe la centra redaktoro W. Gilbert salutas la armisticon en Vjetnamio. Mi citas el ĝi emocian parteton: „Karaj fratoj Kha kaj Trung, lastjare en Bulgario vi diris al mi tute simple: »Ni eltenos« kaj vi pravus. Sed estas io pli: via popolo montras al ĉiuj aliaj popoloj, ke nepotencia nacio povas diri NE al la plej riĉa, plej obstina, aroganta agresanto kaj fine VENKI” — Mi neniam pensis, ke mi foje aplaudos al la konata antineologo d-ro A. Halbedl. Sed nun okazis, ke en la 34-a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo oni faris proponon brulstampi la terurfaman masakron en My-Lai. La prezidanto de la kongreso, itala paroĥestro, tamen rifuzis voĉdonigi la proponon, kaj eĉ ne memorigis ĝin en la kongresraporto. Ĉi tion d-ro Halbedl komentas jene: „Jen malnova klerikula taktiko, kiu nekapablas konscii, kiel ĝi misfamigas sin mem, la reprezentatan eklezion kaj la plej malnovan E-periodikon Espero Katolika kaj E-on mem.” Inter miaj vivuoj mi devas mencii, ke „periodiko” ne enestas eĉ en PIV.

Post la apoteozo de la antineologo H. ni memoru pri alia tiaspeculo V. Pechoč en STARTO, organo de Ĉeĥa E-a Socio. Pri lia konsekvenco nur tiom, ke li pleadas por la senerudiciuloj, havantaj rajton havi facilan E-on kaj tamen li titolas kaj finas sian artikolon per „Caveant consules!”, kiun ekkriion la kompatinda senerudiciulo ne povas kompreni eĉ helpe de PIV. Krome Th. Cart, kiun Pechoč laŭdas kiel grandan disciplinanton, tamen falis en la pekon verki antaŭparolon por la libro de Bourlet: „Dumil novaj vortoj de Zamenhof”. Aliflanke la granda disciplinado de Th. Cart montriĝis kaj efikis precipe kontraŭ uzo de -io por la landnomoj. Kaj jen V. Pechoč ne hontas verki por gazeto, en kiu legeblas Ĉeĥoslovakio kaj Estonio.

En SENNACIULO la nova „prezidanto” P. Levi klopodas difini la tendencon de la gazeto. Laŭ li ĝi estas „malfermita al ĉiu klasbatalanto”. Mi havas tamen skrupulon: manke de firma ideologio ĉu oni povas certe konstati, por kiu klaso do batalas la klasbatalanto, ekzemple Skeldido. — En gvidartikolo W.F. Kruit provas misfamigi la revoluciojn. Li demandas ekzemple, kio restis el la sloganoj de la franca revolucio? Nu, el ĝi fariĝis la nuntempa demokratio de Franclando. Kaj Kruit ja mem laŭdas ĉi tiun Franclandon kiel „bonfarto-ŝtaton” de Eŭropo, kie ne ekzistas revoluciaj cirkonstancoj. Kompreneble, tia evoluo ne iris glate, sekvis teroro, Napoleono, restaŭro de la reĝeco, kaj imperiestreco ktp., sed historio-filozofo devas rigardi la aferojn en historio perspektivo. Poste li demandas, ĉu la rusoj nun ne vivus sur la sama nivelo se la februaran burĝan revolucion ne estus sekvinta la oktobra revolucio. Demando facile respondebla: oni rigardu la landojn, kiuj ne pasis trans sian burĝan revolucion, ekz-e Turkion aŭ multajn landojn Latin-Amerikajn.

Mi jam atentigis pri la japana revueto L'OMNIBUSO. Nun mi ree plezuris pri la ĉi-jaraj du duoblaj numeroj. En ili estas tre ĝueblaj kontribuoj kun speciala japana spico kaj grandpretenda artikolserio pri la japanaj triversoj „Senrjuoj”, variantoj de „hajko”, kun multaj legindaj poemekzemploj originalaj kaj tradukitaj.

En OOMOTO mi legis kun intereso artikolon „La japanoj kaj la judoj” tradukitan de Nakamura (tion cetero, eĉ sen lia subskribo, montrus la frazkonstruo „la elekto la daton de pagana festivalo” kaj similaj). La artikol-aŭtoro interalie similigas verkon de la japana novelisto Nacume al la profetaĵoj de Jesaja. El liaj citaĵoj montriĝas, ke ili ambaŭ eldiris drastajn kondamnojn pri la mondo, tamen Jesaja estas pli tondra-voĉa kaj malpli maldeca.

Mi legis el DIA REGNO, ke unu sola virino, S-ino O' Hare volas malpermesigi, ke la astronautoj kunprenu la biblion ĉe sia kosma ekskurso. La artikolanto petas ĉiujn skribi tuj kelkajn vortojn subtenante la legadon de la biblio dum la kosma veturado. Ĉu en Usono tiel malfortiĝis la poziciodo de la religio, ke ĝi bezonas helpon eĉ el la popoldemokratioj?

El la vivo de hungara E-pioniro Kajetano Seper

Ĉe la E-ekzamenoj en Veszprém, en 1962, inter la ekzamenatoj okulfrapis min la nomo de *Roberto Seper*, ĝardenisto en *Székesfehérvár*. Pridemandinte evidentigis, ke li estas filo de E-pioniro hungara, *Kajetano Seper*.

En H. V. (1962. 3.) aperis interesa artikolo de *P. Balkányi* pri „Esperanto en Hungarlando”. Por ĝia kompletigo ne estas seninterese represigi ĉi tie aŭtobiografion de K. Seper el la jaro 1937. Tiam ni korespondadis inter ni, kaj laŭ mia peto li skizis sian esperantistan vivon en la jena letero:

Estimata Sinjoro! Laŭ via deziro mi sendas al vi la skizon de mia esperantista vivo. Mi povas diri, ke de kiam mi eklernis Eon, mi vivis per ĝi kaj por ĝi.

Mi estas nun 57-jara, kunlaboranto de loka ĵurnalo en Szekszárd, donas lecionojn de la lingvoj franca, germana kaj Ea.

Kiel 18-jara junulo mi estis ankoraŭ sen grandaj esperoj.

Nun mi diros, kiel mi fariĝis esperantisto. Unu aŭtunan vesperon sro poŝt oficisto *Miletz* vizitis mian patron en Kispest. Li montris al li duon-libron, mia patro ĝin rigardis, kaj — diris: „Montru ĝin al mia filo. Mi prenis ĝin; ĝi estis vortara parto de Ea gramatiko.

Gojo ekbrilis sur mia vizaĝo; tion rimarkis la fervorulo *Miletz*.

La sekvan tagon, helpe de la nura vortaro, mi jam skribis poŝtkarton al la libro-donacinto. Post kelkaj jaroj mi ĝin revidis, kaj trovis en ĝi nur unu eraron: anstataŭ „unua” mi skribis „mallasta”. Poste mi lernis ĉiutage 100—150 novajn vortojn kaj tial post nelonge mi fariĝis Eisto, kiu parolas la lingvon kaj eĉ pensas en ĝi.

Sed tio min ne kontentigis: mi volis paroli kun eksterlandano. Kaj tiu baldaŭ alvenis en la persono de sro *Sussmuth*, tre bone parolanta la lingvon. Foje li venis viziti nin en Kispest, ni iris en trinkejon kaj tie amuziĝis ĝis la dua nokte. Tiam mi diris al mia patro, ke mi iros piede al sro *Lengyel* en Szekszárd. Mi faris la 148 km-ojn en du tagoj. Ni estis tre feliĉaj vidi unu la alian. Tie mi ellernis la kompostadon kaj ni faris kune la revuon „Lingvo Internacia” ĝis 1904; tiam, en septembro, ni vojaĝis Parizon. En Parizo mi ellernis la maŝin-kompostadon kaj kiam ni fondis la presejon Ean (Presa Esperantista Societo), ni aĉetis kompostmaŝinon kaj per ĝi kompostis krom „Lingvo Internacia” aliajn E-eldonaĵojn kaj ankaŭ francajn.

En Parizo mi ekkonis la grandajn E-istojn, kiel srojn *Bourlet*, *Cart*, *Boirac*, generalo *Sébert*, *Couturat*, *de Ménil*, *Vérax*, *Fruictier*, *Javal*, *Privat* ktp, sron *Kabe* el Varsovio, kaj kiam oni iris tra Parizo al la Boulogne-a kongreso, ankaŭ nian karan *Majstron Zamenhof*.

En Parizo ni ofte havis kunvenojn kaj E-ajn vespermanĝojn kaj tie mi ofte faris paroladojn, kaj fine la „grandaj” esperantistoj nomis min „profesoro de Esperanto”.

Kiam mi jam sufiĉe konis la francan lingvon, kun la helpo de sro *Carlo Bourlet* mi venis en la grandan presejon de sro *Brodard* en *Coulomniers*. Tie mi fariĝis la unua oficiala E-korektisto. Mi korektis *La Revuo* kaj la E-eldonaĵojn de *Hachette et Ce*. En tiu urbo mi faris E-kursojn bonrezultate. Tie mi laboris ok jarojn. En 1914, fine de februaro, mi kun mia familio entreprenis la ĉirkaŭvojaĝon de la mondo, sed la granda mondmilito nuligis niajn belajn esperojn. Ni estis internigitaj en *Casablanca* (Afriko), poste oni portis nin al la dezerto *Saharo*. Multe ni suferis tie, tute ne sciante kial.

Post la granda militado ni estis reportitaj en nian patrujon en 1919, de tiam mi estas en *Szekszárd*, de kie mi ekiris.

Sed, kara sinjoro, mi ne povas rakonti mian vivon en kelkaj linioj. Se mi iam havus okazon ĉeesti unu el viaj kunvenoj, mi rakontus al vi gajajn kaj malgajajn epizodojn travivitajn.

Mi dankas vin, ke vi intersiĝas pri mia vivo. Malmultaj havis tian suferoplenan vivon, kian mi kun mia amata familio travivis. Tamen, mi estas feliĉa, ĉar mi estas kontenta... kaj mi estas esperantisto! Kore salutas vin,

Szekszárd, la 18-an de junio 1937 Kajetano Seper.

Por kompletigo mi aldonas, ke *K. Seper* naskiĝis en Eger, la 15-an de julio 1880, vivis kelkajn jarojn en Nagyvárad (urbo nun en Rumanio). Li edzigis en Franclando kun *Eugenie Maneth*, lia menciita filo naskiĝis en *Casablanca* (21. VII. 1914).

Pri la menciitaj en la letero famaj E-istoj oni povas akiri konojn aliloke. *Hachette* estis la eldonejo, ĉe kiu aperis la verkoj de *Zamenhof* kaj *Kabe*. Pri *J. J. Sussmuth* kaj *P. Lengyel* vd. la menciitan artikolon de *P. Balkányi*.

**Jozefo Miletz* (1865—1915) estis la unua aktiva Eisto en Budapeŝto (vd. la menciitan artikolon de *P. Balkányi*). La vizito povis okazi en 1899.



Estas malfacila tasko skizi grandan fabrikan tiel, ke la leganto ricevu kompleksan bildon pri ĝi. La temo estas alirebla el la vidpunkto de okmil homoj laborantaj tie, kies 35%-oj apartenas al la konstanta stabo kaj faras fidele kaj ame sian laboron, pretendantan grandan kompetentecon. Oni povas konigi la temon per priskribo de la fabrikaĵoj kaj paroligo de la homoj, kiuj tiujn kreas, — aŭ per mallonga historia resumo. Ni elektis ĉi lastan manieron.


En la tempo, kiam komenciĝis en Hungario la industriigo, kiam validiĝis la tiam akceptita industrio-leĝo, en 1876 B. Eggert petis registron de firmo por funkciigo de entrepreno konstruanta telegrafojn.

Tiutempe jam daŭris la esplorado fare de Graham Bell rilate la telefonaparaton (1872—75). La patentigo okazis 14. 02. 1876. Kunlaboranto de G. Bell estis la hungaro Tivadar Puskás, kiu en 1877 konstruis la unuan telefoncentralon, vekante grandan sensacion en la mondekspozicio Pariza en 1879.

En Hungario Francisko Puskás estis la pioniro, kiu inter multaj malfacilaĵoj ekfunkciigis telefoncentralon en 01. 05. 1881. Nia patrio tiel iĝis en Eŭropo la sesa lando, kie telefona reto ekfunkciis komence kun entute 25 abonantoj. Malgraŭ la malrapideco kaj komplikaĵoj de la komenca evoluo, post kvin jaroj la nombro de abonantoj estis jam 779.

Ni citas el la hungara granda leksikono *Pallas* (eldono el 1897): „En nia patrio okupiĝis per fabrikado de telefonaparatoj la Unuiĝinta Elektra Fabriko (*Egyesült Villamosági Gyár*) antaŭe firmo *Eggert B. kaj Kompanio*, krome la firmo *Deckert Homolka*...”

En la 1886-jara unua hungara industria ekspozicio jam prezentis siajn fabrikaĵojn la firmo „*Eggert B.*” akirante per ili grandan sukceson.



Inter aliaj firmoj ankaŭ tiu entrepreno formiĝis akcia societo en 1896, sed *EGYESÜLT IZZÓLÁMPA ÉS VILLAMOSSÁGI RT.* (Unuiĝinta Ampola Kaj Elektra A.S.) baldaŭ transprenis la telefon-fabrikantan uzinon, kiu en la sekvaj jaroj kiel parto de la A.S. daŭrigis sian laboron.

Komence de la 1910-aj jaroj oni fabrikas jam permane kluĉantajn centralojn por eksporto, ĉefe al Rumanio, Serbio kaj Turkio.

Inter la telefoncentraloj, konstruitaj post la unua mondmilito, en Budapeŝto jam ekzistas manklučaj centraloj kun 20 000 linioj. En 1928 la telekomunikada parto eliĝis el la lastnomita A.S. kaj formiĝis je „*STANDARD VILLAMOSSÁGI RT.*” (Elektra Akcia Societo *STANDARD*).

Post la dua mondmilito la fabriko estis alŝtatigita, kaj dudek jarojn post la ŝtatigo la fabriko alprenis la nomon:

BELOIANNISZ HÍRADÁSTECHNIKAI GYÁR (BHG).

Telekomunikada Fabriko Beloiannis.

Rememorante, ke la firmo B. Eggert komence havis malpli ol 100 laboristojn, la evoluon ilustras jenaj etaciferoj: en 1936 — 1991, en 1953 jam 5668, — kaj hodiaŭ pli ol 8000 laboruloj apartenas al la granda laborfamilio de BHG.

Post la alŝtatigo formiĝis la memstara evoluiga fabriksekcio, kiu inter la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj klopodis kun freŝaj fortoj sur novaj vojoj esti ĉiam laŭtempa kun la konstante kreskanta evoluo. Ĉi tiun klopodon kronis plena sukceso.

Dum la postmilitaj tempoj la fabriko produktis radioprogram-sendilojn, mikroondojn kaj aliajn tele-teknikajn aparatojn, telefoncentralojn kaj telefonojn. Por tiel multspeca produktado la ĝistiamaj kadroj de la fabriko jam ne sufiĉis kaj tial komence de la 60-aj jaroj okazis moderniga trakonstruado de la uzino je kosto de pluraj centmilionoj da forintoj kaj kun soveta helpo. Rezulto estis plibonigo de la produkta kapacito.

En tiu periodo okazis ankaŭ la specialigo de la fabrikado instigata ankaŭ de la en- kaj eksterlanda interesiĝo. Ja eĉ la debito de telefoncentraloj plenigis jam la produktokapablon de la fabriko. Sekve de la specialigo, nun jam pluraj Hungariaj granduzinoj okupiĝas per fabrikado de profesiaj telekomunikadaj instalaĵoj.

La ĉefinstituto de BHG en Budapeŝto (XI. Fehérvári út) estas la plej granda inter tiuj uzinoj. Ĝiaj filioj en provincaj urbetoj *Tatabánya* kaj *Kunhegyes* donas laboreblecon al la gejunularo de tiu ĉirkaŭaĵo. La konstante evoluanta fabriko konstruas nuntempe sole telefoncentralojn, — kaj ĝiaj laboruloj, konsciante sian respondecon, faras sian laboron, gravan ankaŭ por la popola ekonomio. La pretproduktaĵoj kaj ekipaĵoj — faritaj de ili — anoncas la bonan famon de la fabriko kaj de ĝiaj varoj en multaj partoj de la mondo. Tion karakterizas, ke krom la hejmlanda utiligo proksimume 80% de la produktaĵoj estas akceptataj en la internacia merkato. Inter la plej grandaj partneroj de BHG ni mencias. Britlandon, Ĉeĥoslovakion, German. Demokratian Respublikon, Pollandon, Sirion kaj Sovetunion.

Ĉiloke ni mencias, ke la entrepreno priservas la bezonojn de la Hungaria Poŝto kun plej granda zorgo, plenumante ties mendojn per konscienca atento. La tutmonda rekono de la Hungaria Poŝto, kiu ja estas la plej malnova partnero de la fabriko, ankaŭ kunhelpis plivastigi la renomon de BHG.


85% de la produktaĵoj (konsidere de la tempo de pretigo) estas kreaĵo ne pli ol kvinjara.

Je fino de la 1950-aj jaroj formiĝis la moderna *krosbartekniko*. 90%-e estas konstruataj nuntempe centraloj laŭ krosbar-sistemo. La adapto de la elektona-tekniko ankaŭ plene estas rezulto de la hungara evoluigo.

Pro la dinamika kresko, la fabriko duobligis sian produktaron dum la lastaj dek jaroj. Depost 1968 la meza kresko de la produktado estas jare 16%-a. Por plua akcelado de la evoluo — en intereso de teknika kunlaboro — BHG ligis kontrakton kun sveda firmo *LM Ericsson*.

Krom la industriaj taskoj la entrepreno multe prizorgas interesojn de siaj laborantoj. En la refreŝigejoj de la entrepreno trovas ripozeblaĵon la laboruloj kaj preskaŭ ĉiuj iliaj familianoj. En *Balatonszabadi*, *Balatonlelle* kaj en la apudbalatona urbo *Keszthely*, en kiu lasta la plej moderna ripozdomo — nun por 150 personoj — ebligas la someran ripozadon. Ĝia pliampleksigo jam planata.


La Telekomunikada Fabriko Beloiannis estas la plej granda fabriko de telefoncentraloj en Mezeŭropo, kaj inde al sia bona pasejo kaj aktiva prezenco, ĝi estos plu grava faktoro de la telefonteknika evoluo.



CA-22



SUBȚIELA ETNOGRAFIA MUZEO EN GÖCSEJ



Göcsej (göcsej) estas sudokcidenta provinco de Hungario. La unuan subĉielan etnografian ekspozicion en Hungario oni aranĝis en 1896 okaze de la miljara datreveno de la landokupo. La modelon al ĝi donis la Sveda Liberaera Muzeo estigita en la stokholma zoologia parko en la jaro 1891. Tiu ĉi skanzeno — nomata laŭ la estiĝloko — fariĝis mondfama.

En 1966 en Zalaegerszeg oni malfermis la unuan konstantan subĉielan etnografian muzeon, laŭnome: Göcseja Vilaĝmuzeo. Poste estiĝis la iom pli malgranda liberaera muzeo en Tihany kaj kelkaj malgrandaj etnografiaj muzeoj. Nuntempe oni konstruas en la suburbo de Szentendre (proksime al Budapeŝto) la plej grandan etnografian muzeon, kiu prezentos al la publiko vilaĝajn loĝdomojn, kamparanajn konstruaĵojn, preĝejojn ktp., grupiginte ilin laŭ la karakteriza konstrumetodo de diversaj pejzaĝoj.

La vilaĝmuzejo en Göcsej estas la unua signifa subĉiela etnografia kolekto de Hungario. La konstruantoj faris pioniran laboron: en la lasta momento sukcesis kolekti kaj savi la pereantajn popoleskajn arkitekturajn valorojn de tiu ĉi unika teritorio. La impona kolektaĵo prezentas fidelan bildon pri la paseo de göcseja regiono. La muzeo konsistas el 46 konstruaĵoj (6 loĝdomoj, 4 furaĝejoj, 3 putoj, du keloj, kamero, stalo, abelujo, sonorilejo, akvomuelilo, forĝejo, brandkuira kabano, kolombejo ktp. troviĝas en la kolekto).

La loĝantaro de Göcsej devenas el la patrujokupantaj hungaroj kaj de la slavaj, varhonaj praloĝantoj. Tiu ĉi teritorio estis limdefenda regiono de la lando. La vivmanieron de la popolo kaj la mastrumadon decidis la arbarmastrumado. La laborilojn, meblojn, mastrumadajn objektojn ili skulptis el ligno. Same la arbo estis la materio de la domoj kaj diversaj konstruaĵoj. Göcsej estas la centro, riĉe varianta teritorio de la popoleska konstrumanierejo. La savitaj arkitekturaj memoraĵoj gardas la praktikajn metodojn, samtempe ili bonvideble montras ankaŭ la evoluon. Tiu ĉi kolekto estas grava ankaŭ el scienca vidpunkto, ĉar ĝi fidele spegulas la historion de la vulgara arkitekturo. La rapidege disvastiĝanta efiko de la urba vivmaniero neniigus tiujn ĉi malmodernajn konstruaĵojn kaj post mallonga tempo eĉ memoroj ne restus el ili. La estigo de la subĉiela muzeo estis la unusola solvo por gardi tiujn valorojn.

La vilaĝmuzeo prezentas loĝlokon el la tempo de jarcentoturniĝo. La konstruaĵoj kaj ties instalaĵoj estas translokigitaj ĉi tien el la vilaĝoj de la regiono.

La muzeo estas malfermita: de la 1-a de aprilo ĝis la 15-a de oktobro ĉiutage — escepte lundon — inter la 10a kaj la 18a.

La titolpaĝa kaj jenaj bildoj — fotoj de la juna, talenta kunlaboranto de nia revuo, János Eifert — donas gustumaĵon pri la specialaj belaĵoj de la intereso, valora kolekto.

Tr. A. CSISZÁR

FOTOJ DE JÁNOS EIFERT



FACILAJ LEGAĴOJ

Szilárd Bálint

ALIBIO

La sunsubiro estas admirinde bela, sur la duono de firmamento orflava koloro alternas kun blua, framboruĝa kun arĝenta. Miliardoj da lumradioj dancas sur la dorso de la mildaj ondoj. En boato virino kaj viro balanciĝas malsupren sur la rivero. Ambaŭflanke en malhelaj kaj flavverdaj koloroj staras kordonon fraksenoj, poploj kaj plorsalikoj. Kelkfoje, kiel nigraj globetoj, viglaj fulikoj glitas antaŭ ili, digloplene ekflugas longpiedaj grizaj ardeoj aŭ kvikantaj vaneloj.

Ili antaŭeniras malsupren, kiel la rivero rapidas al la maro, la boato preskaŭ drivas per si mem.

— Mi diris al vi, ke la ekskurso sur la rivero estas fabele bela... — ekparolas la viro.

La virino revante rigardas al malrapide malaperanta bordo, kie malantaŭ la arboj nun falas la suno kaj ŝi respondas nenion.

— Ĉu vi povas naĝi? — demandas la viro.

Margareta eklevas la kapon; ŝajnas, ke ŝi eĉ ne pensas pri tio, kion la viro diras. Proksime de la bordo altaj palisoj elstaras el la akvo, kiuj tenas nasojn. Ili estas fiŝkaptiloj. La stultaj fiŝoj el sube naĝas en ĝin, poste restas interne, kiel arestita birdo en kaĝo. Subkonscie en ŝi vekigatas penso, ke ŝi respondu:

— Ne... tute ne...

— Kiam mi estis kvarjara, mia patro komencis instrui min naĝi. Li enĵetis min en la akvon. Mi ploris, kriegis, blekis, sed trabaraktis ĝis la bordo. Ĉiutage kelkfoje li mergis min. Post monato mi iĝis naĝanto... — fanfaronis la viro.

— Ne timu... ĉi tie la rivero ne estas danĝera... — li trankviligis ŝin.

Jam malheliĝas la ĉielo, kelkaj brilaj steloj jam komencas aperi sur la firmamento. La boato denove drivas trankvile laŭ la fluovojo.

— Mi estas graveda... — diras la knabino.

Ambaŭ silentiĝas, nur la akvo ekplaŭdas ĉe la flanko de la boato. Kontraŭ ili ŝipeto venas, blanka lumo de reflektoro prilumas la vizaĝojn. La viro kun rigida rigardo kontemplas la virinon: — Migdalformaj okuloj, belforma nazo, mola buŝo, alta pura frunto, glate kombitaj blondaj haroj falas sur la ŝultrojn de la fraŭlino...

Poste abrupte iĝas malhelo. La lumo de la ŝipeto forflugis, novajn partojn lumigas la reflektoro ĉe la bordo de la rivero, poste definitive malaperas.

— Kion vi volas fari? — diras la viro.

— Mi ĝin tenos... mi naskos...

— Tio estas neeblo... kiel eble plej rapide vi devos iri al kuracisto!

— Mi ne iros... mi timas de operacia aborto, ankaŭ tiam, se oni faras ĝin en kliniko kun kuracista asistanto... Vi kredigis, kiam okazis la afero, ke mi ne timu, ĉar ni poste certe geedziĝos...

— Ĉu estas certe... ke la infano apartenas al mi? — demandas la viro kun konsterno.

Dume la plena luno aperas sur la ĉielo kaj kun blanka lumo inundas la riveron. Ie sovaĝbirdo ekkrias, ĉaspelante rifuĝantan oferboston. La viro per malrapidaj movoj remas al la mezo de la rivero.

— Vi scias bone... ke mi havas neniun krom vi...

— Jam ofte okazis la sama evento false!

Malgrandaj arĝentaj globetoj dancas sur la rivero respegulante la lumon de la luno. La viro forte cerbumas pri tio, kiamaniere ŝin konvinki, ke oni ne akceptas tiel la infanon naskitan ekster geedzeco, kiel la laŭleĝe naskitan.

— Mi volas meti sanan infanon en la mondon... mi ne volas riski... kiun mi riproĉu, se post la operacio neniam plu mi povos naski... — levas la virino la belan, seriozan kapon.

— Mi ne povas edziĝi al vi... ĉar mi estas jam edziĝinta... Iru al kuracisto, mi pagos la duonon de la prezo. Ne misuzu mian situacion!

— Vian situacion?!... Mia situacio ne estas grava... nur la via?... Kial vi mensogis, ke vi estas fraŭlo?... Disiĝu de via edzino!!... Ŝajnas, ke la viroj volas nur la korpan amon kaj ekspluatas la virinojn...

Nubo kovras la lunon, vento blovas tra la rivero kaj ŝanceladas la boaton.

— Aŭskultu min... mi scias, ke mi estas fripono, mi mensogis al vi... Antaŭ kvin jaroj mi edziĝis. Mi estis malriĉulo, kiam mi finis la universitaton. La gepatroj de mia edzino faras grandan mastrumadon, gastigado sekvas gastigadon... Multfoje mi konfuziĝis pro la uzado de diversaj manĝiloj, glaso kaj drinkaĵoj... Mi ofte sentas komplekson de malsupereco. Mia edzino havas du vizaĝojn, unu ekskluzive por la gastoj kaj amikoj, alian, la ordinaran por la familio, kiam ŝi estas ĉiam kolereta, murmurema kaj malkontenta... Mia salajro estas bona, sed neniam ni havas sufiĉan monon, ĉar ĉion ŝi malŝparas.

— Ne interesas min via vivo... parolu pri nia afero!

— Lasu min fini... mi petas. La ĉiamajn scenojn mi tute ne povas elteni... pli volonte mi silentas, sed mi jam ne povas pli elporti. Mi estas malliberulo en mia propra hejmo... Ĉu mi trabatu ŝin?... Ankoraŭ mi neniam inter-

batadis!... Fine mi decidis, ke mi serĉas konsolon ĉe alia virino...

— Eksedziĝu!

— Mi tute ne povas tion fari... ĉar mi ankoraŭ ŝin amas!

— Vi estas malhonestulo, ĉarlatano de edziĝo... mensogema sovaĝbesto!... Saltu en la akvon.

La nubo forlasis la lunon, denove brila, arĝenta lumo etendiĝas super la rivero. Abrupte satana ideo venas en la cerbon de la viro. Kion ŝi diris? „Ne... tute ne... mi ne povas naĝi...” Kio okazus, se ŝi hazarde dronus?... Mi anonciĝus ĉe la policanejo kaj konfesus, ke la boato renversiĝis, la virino subakviĝis kaj dronis, mi serĉis ĉie, sed ŝin neniel trovis... okazis akcidento... La voĉo de la virino revekas lin:

— Vi fiulo... jam proksimiĝas la urbo, stiru la boaton en tiu direkto!

La viro delasas la remilojn kaj denove komencas ŝin petegi:

— Neniam! — ŝi ekstaras — donu al mi la remilojn!

La tremantaj lumoj de la urbo saltas al alto antaŭ la okuloj de la virino, kiam ŝi falas en la akvon kun granda ekplaŭdo.

Ie sono de ŝipkorno flugas super la rivero kiel sireno. El la direkto de la urbo voĉon de sonorizado alportas la vento. Sinistraj signoj el ĉiuj flankoj.

La viro kaptas la remilojn kaj rapide komencas remi al la bordo. Nur por momento li retrorigardas kaj vidas, ke malgranda blonda bobenaĵo kaŝvagadas en la akvo. Li ŝvitas, fortostreĉe li tiras la remilojn. La flavaj lumoj de la urbo ĉiam pli forte alproksimiĝas. La bordo estas senhoma, nur ie en la malproksimo aŭdiĝas forta klakado de brue ruliĝanta trajno. La koro de la viro pulsadas en sia gorgo. Li parolas al si, la voĉo de la konscienco kvazaŭ tondras en lia brusto.

Antaŭ ol albordiĝi, li enakvigas sin, ke li estu malseka antaŭ la policoficiro. De la freŝa akvo li ion trankviliĝas kaj kun forta impeto li enpuŝas la boaton al la drivo de la rivero.

Dume Margareta kun fortoplana impeto naĝas al la transa bordo, kaj pensas pri tio, kio okazus, se ŝi vere estus graveda...

INTERESAĴOJ

Insekto-horo. La Kazahstana in-sekt-esploristo P. Marikovskij pretiĝis speciale sentivan magnetofonon por fiksado de la voĉo de insektoj. Per sia aparato — interalie — li konstatis, ke la cikadoj, konataj pri sia kanto, komencas kanti nur post kiam ili kunvenis sufiĉe multaj, kaj ilia „antaŭkantisto” donis signon por ekkantado. La malrapidigitaj magnetofonrubandoj montris, ke el pluraj cikadoj unu estas la solisto, la aliaj poste aliĝas kiel akompanantoj. Se oni silentigas la soliston, eksilentas ankaŭ la akompanantoj. La cikadoj de la sod-grundaj kampoj kantas nur tiam, kiam regas silento. Se, ekzemple, griloj aŭ ranoj voĉas en ilia proksimo, ili ne entreprenas konkuron, sed tiriĝas al loko pli silenta.

Superpapero. Fakuloj Leningradaj faris paperon multe pli fortan ol la kartono; ĝi pretiĝas per kombino de longfadena vitropapero kun celulozo el betulo kaj abio. La papero estas fajro- kaj lesiv-rezista.

Defendo de akvokvalito. Signifan kontrakton subskribis la Evoluiga Fondumo de UNO (UNDP) kaj la reprezentantoj de la hungara organo por defendo de akvokvalito. Laŭ ĝi, UNDP donas unu milionon da dolaroj, por ke ĉe ni oni estigu model-regionojn de akvokvalito. Ĉi tiu subteno ebligas mezurojn kaj analizojn per la plej modernaj aŭtomatoj por esploroj de akvokvalito. Dum la 3 jaroj de la programo oni esploros en la respektivaj regionoj la mempurigan kapablon de la riveroj, la komponentojn de la akvo kaj ellaboras ankaŭ novajn procedojn por akvo-purigo. Dumlabore la hungaraj fakuloj studos plurajn eksterlandajn procedojn kaj al la eksterlandaj esploristoj interesiĝontaj ili disponigos la plej freŝajn rezultojn.

Savi la abelreĝinon. Se oni ĉiujare ŝanĝas la abelreĝinon en la abelujo, per tio pligrandiĝas la mielrendimento de la abelfamilio. Sed la abeloj ne ĉiam akceptas la novan reĝinon: kelk-

foje ili mortigas ŝin. Sovetaj esploristoj konstatis, ke la sintenon de la abelfamilio kontraŭ la nova reĝimo oni povas antaŭvidi per la karaktero de la sonoj, kiujn aŭdigas la familio per la vibrigo de la fluilj. Se la frekvenco de la sono estas sub 165 hercoj, tiam ili lojale akceptos la reĝinon, sed se ĝi estas inter 300 kaj 440 hercoj, tiam ili montras per la pri granda frekvenco sian ribelan koleron. Nu, oni povas enmeti la reĝinon tiel, ke oni ĝin provizore ŝirmas per eta reto. Poste oni determinas la frekvencon de la abelar-zumo kaj laŭ tio reprenas aŭ lasas interne la reĝinon.

U-vitamino. De du miljaroj la brasiko estas plaĉe manĝata legomo, sed nur antaŭ du jardekoj rimarkis Usona esploristo, ke ĝi havas ankaŭ efikon kuracan. Per manĝigo de kruda brasiko kaj trinkigo de brasik-suko li povis sanigi stomak-ulcerojn. Li supozis, ke en la brasiko troviĝas ia substanco saniga kaj li ĝin nomis (laŭ Ulcero) U-vitamino.

Poste en Usono oni ankaŭ ekstraktis tiun substancon el la brasiko. Montriĝis, ke temas pri ĥemiaĵo tre parenca al la metionino, grava amin-acido kies manko en la nutraĵoj estigas perturbojn en diversaj glandoj. En la U-vitamino al tiu metionino kroĉiĝas ankoraŭ unu klor-iono kaj unu etilradikalo; ĉi tiuj ĝin aktivigas por defendo de la stomak-mukozo. Malavantaĝo de la kuraco estas, ke la pacientoj devas preni grandegajn kvantojn: du kg-ojn da brasiko aŭ unu litron da brasik-suko tage; dum 5—6 semajnoj 30—40 litrojn da brasika suko.

Sovetaj bioĥemiistoj nun ellaboris la artefaran sintezon de la U-vitamino. La preparaĵo havas tian kuracforton kiel la brasik-suko, kaj krome estas longe tenebla sen efikperdo kaj estas prenebla komforte en tablojdoj.

La klinikaj provoj estis plene kontentigaj; baldaŭ oni komencos la industrian fabrikadon de la medikamento.

kvk

Hungario en la spegulo de la mondekonomio

Lastatempe, sed precipe ekde la enkonduko de la ekonomia reformo de la jaro 1968., grandmezure disvastiĝis la internaciaj komercaj rilatoj de nia patrio. Ne troviĝas mondparto, kiun ne atingus produktaĵoj de Hungario. La ĉiam kreskanta ŝanĝ-trafiko de varoj grandparte kontribuas por la plibonigo de la bilanco de ŝtatekonomio kaj al la pliriĉigo de la enlanda varelekteleco.

Por prezenti la kreskantan interesiĝon de la eksterlandaj mendantoj ni mencias nur kelkajn indikojn. La teksaĵfabriko de urbo Pápa liveras en 46 landojn siajn t.n. bunte-teksitajn teksaĵojn. Ĉijare ekzemple oni liveras en Anglion 1, en Francion 1,7 milionojn da kvadratoj da teksaĵo. Ĵus alvenis mendo el Japanio.

En la kuranta jaro la rikolto de pomo estis mezkvanta, preskaŭ ĝian duonon ni eksportas krom la socialismaj landoj en Germanan Federacian Respublikon, en la skandinavajn landojn kaj en Brazilon.

Krom la eksporto de fruktoj pligrandiĝis ankaŭ la eksporto de legom- kaj frukto-kondensaĵoj.

En majo de la pasinta jaro efektiviĝis kontrakto kun unu el la plej grandaj mondfirmaoj pri oleo kaj movmaterialo, kun British Petroleum. La angla firmao entreprenis kontribuon preskaŭ per 25 milionoj da forintoj por konstruo kaj funkciigo de dek movmaterial-stacioj. Krom tiuj dek lokoj ankoraŭ en 86 aliaj movmaterial-stacioj de ÁFOR oni vendos BP-produktaĵojn.

En Okcident-Eŭropo plifortiĝas la intereso por la lignodomoj. Krom Germana Federacia Respubliko ĉijare sin anoncis ankaŭ aŭstria, nederlandaj, francaj kaj italaj firmaoj kiel mendantoj.

Suojn, vestaĵojn ni eksportas en Pollandon, en Sovetunion, en Germanan Federacian Respublikon kaj en Francion.

Estas tre grandsignifa ankaŭ nia eksporto de nutraĵoj kaj vinoj.

Tr. L. RIETH

Inter la edukproblemoj la Internacia Lingvo kompreneble kaj logike prenas sian rolon en- kaj eksterlernejan; ne mirinde do, ke la aŭtoro elektis *Esperanton por la fremdlingva resumo*. Ties amplekso kune kun la *dulingveco* de la multaj klarigaj tabeloj, grafikonoj ktp. sufiĉe konvenas por ne-hungara leganto orientiĝi en la volumo; resp. por institutoj, interesiĝantoj ebligas certajn partojn de la hungara teksto traduki por pli detala studo. Jen praktika uzebleco por la internacia lingvo, kiu *per si mem* demonstras kaj argumentas! La libro do samtempe servas por ni, ankaŭ por ne-edukistoj, kiel bona propagando-modelo, ĉefe en sciencaj medioj. (HEA volonte helpas por interesiĝantoj akiri ekzemplojn.)

E. F.

LA BIRDSPECOJ DE HUNGARLANDO

Antaŭnelonge aperis ĉe la Akademia Libroeldonejo la dudekunua volumo pri la animala vivo en Hungarlando. La 448-paĝa volumo prezentas la birdojn troveblajn en la lando. Kiu pensus, ke ekzistas 326 specioj vivantaj parte libere, parte kiel kortbirdoj. En la dika libro ni trovas ĉiujn necesajn kaj interesajn indikojn kaj 214 bildojn, kiuj prezentas iliajn ĉefajn karakterizojn, la vivkutimojn, kie ili estas troveblaj, kiel ili konstruas siajn nestojn, kia estas ilia utilo aŭ malutilo en la naturo kaj fine kiaj estas iliaj rilatoj al la homoj.

P. B.

NOVA SCIENCA VERKO -- KUN ESPERANTA RESUMO

VADAS GYÖRGY: A nagy modell (La granda modelo), 200 p. grandform., ofsetita, kun tabeloj, Esp. resumo 30 p.

Nova ampleksa verko aperis — hungarlingve — pri la perspektivoj de la edukado, tiom grava kaj urĝa problemaro por la rapide evoluanta homaro. La verko profunde analizas la nuntempajn obstaklojn kaj difektojn de la historie disvolviĝinta edukado, la lernejan sistemon kaj apudmetas ilin al la ŝtorme kreskantaj sociaj-homaj bezonoj. La aŭtoro prikskribas la bezonatajn konkludojn kaj necesajn modifojn, kiujn ŝtato kaj socio devos en la afersfero de la tuta edukado (de la unuaj infanjaroj dum la tuta homa vivo) prepari kaj transformi, eĉ plu disvolvi, por atingi multflanke kulturitan, aŭtonoman kaj

progreseman, moralhavan personecon. Ĉio ĉi postulas tre vaste koneksitan kunlaboron anstataŭ la ankoraŭ diserigitaj edukaj kaj lernejoj sistemoj: la aŭtoro lanĉas vastskalan projekton — la grandan modelon — por kunordigi la multajn elementojn de la tuthoma edukado. Skizas la interrilatojn de universala edukado, ĝenerala kaj faka instruado, teknika kaj scienca kvalifikado, eĉ kunligas tiujn kun ludo, distro kaj korpeduko.

La Modelo bazas sin je la solveblecoj de la disvolviĝanta socialisma socio, je la nuno, tamen lasas sin gvidi laŭ la jam videblaj perspektivoj. Foje anticipas „futuraĵojn” ideojn aŭ solvojn, tamen la leganto estas invitata kaj pridiskuti, kontraŭdebatu, kaj daŭrigi, plenumi la meditoseriojn.

KIOM VALORAS LA VINO DE TOKAJ?

Okaze de la unua mondkonkurso de vino, aranĝita en Hungarlando, oni okazigis ankaŭ vin-aŭkcion. La elstarulo de la aŭkcio estis sendube la tokaja asuo (sekvinber-vino) el la jaro 1875. Post longa serio de ekscitaj konkurproponoj, anstataŭ la baza aŭkcia prezo de 79 dolaroj, ĝi venis fine en la posedon de svisa firmao kontraŭ 248 dolaroj. La tokajan samorodnion el la jaro 1917 aĉetis la hungara firmao MONIMPEX por 1800 forintoj, dum la altkvalita tokaja asuo el 1937 vendiĝis por 43 dolaroj. Fine en la aŭkcio pli ol 500 boteloj, plenaj de valora vino, trovis sian aĉetanton.

La netuŝebla verdikto

En la klasikaj patrujoj de la ĵuria tribunalo, en Britlando kaj Franclando, la verdikto estis sankta kaj netuŝebla.

Jen la Londona kazo *Lesari*.

En marista drinkejo, ĉe interbatiĝado, iu mortpikis anglan junulon. La polico trovis ankaŭ la tranĉilon kaj ties mastron: italan mariston nomatan Lesari. La afero venis antaŭ ĵurian tribunalon. La akuzato nenion komprenis el la tuta pritraktado, kaj ĉi tiu ne daŭris longe. Tiam oni sciigis lin, ke la ĵurio trovis lin kulpa kaj la juĝisto kondamnis lin je morto.

Oni ankaŭ pendigus lin, se hazarde ne trafus tien unu lia samlandano. Post la deklaro de la juĝo, tiu alparolis la kondamniton, kaj ĉi tiu, nun jam povante paroli itale, viglalange eksplikis, ke la tranĉilo ja estis lia, sed ankoraŭ antaŭ la interbatiĝo li ĝin vendis al sia maristkunulo Dalgeri, kaj ĉi tiu mortpikis la junulon. La itala sinjoro kuregis al la lordkanceliero, petegis pri prokrasto, poste komencis serĉi la kulpulon, kaj ankaŭ trovis lin en Liverpool. Li trovis ankaŭ du atestantojn, kiuj ĉeestis, kiam Lesari vendis la tranĉilon al Dalgeri. Kaj ĉi lasta neniom neis: li puŝis la tranĉilon en la anglon.

Nu jes, sed la ĵurio jam eldiris, ke la murdinto estas Lesari, sekve, pro la sama kulpo oni plu ne povis puni iun alian. Kaj fakte, la vera murdinto ne estis prirespondigita: li povis libere drinki ankaŭ plue en la maristaj drinkejoj. La senkulpan Lesari, siavice, oni devintus pendigi laŭ la juĝo; tamen, ĉi tion apenaŭ aprobus la laika publika opinio. Sen ĉu nuligi la verdikton de ĵurio? Tio estus kvazaŭ frakasi breĉon en la rokfortikaĵo de la angla konstitucio. Oni elturniĝis fine tiel, ke la reĝo donis al li pardonon indulgan.

Jen alia ekzemplo, malpli sombra, pri la netuŝebleco de la verdikto. Pro landvoja rabo oni starigis viron antaŭ ĵurion en Oxford. Vane li negadis, la cirkonstancaro estis klara, la prirabito mem rekonis en li la kulpulon. La ĵurianoj jam volis retiriĝi por fari sian verdikton, kiam de ekstere aŭdiĝis hufoprapado de galopanta ĉevalo, poste ekscitata kriado. Malfermiĝis la por-

do, enkuris viro kaj rigardis en la okulojn de la prirabito longe, rigide. Al ĉi tiu kaj ankaŭ al la juĝisto kaj ĵurio gape malfermiĝis la buŝo: la veninto estis tute tiel vestita kiel la akuzato kaj similis ĉi tiun kiel unu ovo la alian.

Laŭ la ordono de la juĝisto, la veninto ekparolis: *li* estas la vera farinto de la krimo. Ĝis nun li silentis, ĉar li pensis, ke la alia povos sin ekskuzi. Sed lastmomente li sciigis, ke ties afero staras malbone, kaj ekvoĉis lia konscienco: *prefere li estu pendumita, ol ke pro li senkulpa homo mortu.*

La klara afero fariĝis tute konfuza. La prirabito diris, ke eĉ se oni pendumos lin mem, li ne povas distingi inter la du homoj. Sed, ĉar la kulpulo sin anoncis en la persono de la dua homo, la ĵurio ne povis fari alion, ol deklari, ke la unua homo ne estas kulpa. La juĝisto do deklaris lin senkulpa kaj libera, arestigis la duan homon, kiu surprenis la krimon, kaj transmetis la kazon al nova ĵuria tribunalo.

Ĉe la nova pritraktado sciigis pri la dua homo, ke li estas ĝemelfrato de la unua. Poste la juĝisto metis al li la demandon, ĉu li sentas sin kulpa?

Nun venis la surprizo.

Kiel do? Ĉu li? Kulpa? Neniel! Kiam la rabo okazis, li estis dudek mejlojn malproksime de Oxford.

Oni envokis la atestantojn, kaj tiuj konfirmis la alibion.

The devil! Kiu do estas la kulpulo?

—Mia ĝemelfrato, kiun oni deklaris senkulpa.

La konfuza afero fariĝis plene klara. La rabon kulpis vere la unua akuzato. La aŭdaca truko estis konsilita de advokato sperta je juraj ruzaĵoj. Kaj ĝi sukcesis. Vane fariĝis jam evidenta, kiu estas la vera krimulo: la ĵurio jam deklaris lin senkulpa kaj la verdikton oni ne povis ŝanĝi.

Tr.: K. KALOCSAY

István RÁTH-VÉGH (1870—1959), juristo kaj beletristo. Lia preferata tereno estis: kolekto kaj prilaboro de kulturhistoriaj kuriozaĵoj, kiujn li eldonis en pluraj volumoj. La supra parto estas prenita el lia „Nigra kroniko”.

EL LA MONDO DE LA LINGVOJ

Sen la kono de la mondlingvoj — aŭ almenaŭ de iu el ili — ĉiam malpli ni povas iri samritme kun la scienca-teknika revolucio, kun la plirapidiĝo de la interkomunikado kaj de la informofluado. Unu el la plej lastaj kuriozaj enketoj konstatas: en Hungarlando almenaŭ trioble pli da plenkreskuloj bezonas lerni fremdan lingvon, ol kiom el ili oni povas konsideri lingvotalentulo, laŭ la malnova kriterio. En la ĉiam pli internaciiganta mondo konsekvence multaj estas devigataj lerni lingvojn, ankaŭ se mankas al ili la t.n. lingvotalento (kies ekziston aŭ karakteron entute kontestas la fakuloj.) Arase la homoj venas al tiu konkludo. Kiom pli estas do motivita kalkuli je tio ankaŭ ĉe ni.

La fakuloj de la lingvoinstruado asertas, ke ĉiu povas proprigi al si fremdan lingvon laŭ utiligebla mezuro, se kun ĝusta metodo, kun firma volo kaj ne lastavice kun la necesa diligento li iras al sia celo. Krome estas vere, ke al la lernado de fremda lingvo oni devas antaŭprepari sin konvene. Pedagogoj ĉiam pli multfoje plendas, ke la pli junaj aŭ malpli junaj lingvolernantoj ofte ne konas necesgrade eĉ la fundamenton de sia gepatra lingvo. Domaĝe, ĉar sen tio ne estas antaŭvidebla rezultoplena progreso en la alproprigo de iu ajn fremda lingvo. (*Népszabadság*)

— o —

Laŭ Alexander Manuila, la gvidanto de la tradukkontoro de WHO, la Sanitara Mondorganizo, en la mondo aperas jare ĉ. 50 mil medicinistaj eldonoj. En po unu temaro aperas eĉ 10—12 fakrevuoj. Pro tio Manuila rekomendas la ordigon de la situacio, ĉar la praktikantaj kuracistoj ne havas tempon por trastudi tian amason da informoj. (*Esti Hirlap*)

— o —

Generale malmulte da angloj scipovas ekparoli en fremda lingvo. Estas imageble, ke post la aliĝo al la Komuna Merkato ili bezonos pli da lingvokono. Oni jam komencis la lingvolernadon en la Londona Whitehall: la diplomatoj kaj registaraj oficistoj lernas pliparte france aŭ germane, sed ankaŭ itale kaj nederlandlingve.

Tio estas granda ŝanĝo, ĉar en Londono oni jam tre kutimis, ke la gepatra lingvo ĉiam sufiĉas. Kompreneble estas demando, ĉu tiu „kutimo” vere aliĝos en la estonteco. La prihegemoniaj diskutoj ene de la integriĝo povos rezulti ankaŭ prolingvaj malakordojn, ĉar pli-malpli frue povos leviĝi la demando: kiu estu la „ĉefa lingvo” en Bruselo. (*Magyar Nemzet*)

— o —

Dum unu monato, pli precize dum 24 labortagoj iu ajn povas ellerni la anglan, germanan aŭ francan lingvon en la Moskva eksperimenta kurso, kiu dum la kvin jaroj de sia ekzisto per 600 volontulaj partoprenintoj pruvis la atingitan bonan rezulton. En la kurso, funkcia provizore kiel fakultato de la Moskva arkitektura altlernejo, per la metodo de prof. Sehter oni evoluigas surprize fluan parolkapablon en la kursanoj helpe de la 2000 plej oftaj vortoj de la koncerna fremdlingvo.

Krom la plej bona enmemoriga tekniko bazita parte sur muzikaj efektoj, kaj tute ekskludanta la penigan enkapigadon, — helpe de kiu tekniko la kursanoj kvazaŭ nerimarkante ellernas multajn dekludojn da novaj vortoj dum unu okupiĝo — en la kurso oni intense aplikas ankaŭ la aliajn modernajn psikajn trukojn kaj aŭdovidaĵajn rimedojn de la lingvoinstruado. Sekve de la rezultoplena Moskva eksperimento oni starigas similajn fakultatojn en Leningrado, Tifliso, Jerevano, Bakuo kaj ankaŭ en aliaj sovetaj universitataj centroj. La interesiĝo por la kursoj estas eksterordinara. (*Népszabadság*)

Trad: TIBOR UJLAKY-NAGY

HUMURO

La avino parolas al sia nepino pri siaj malnovaj memoraĵoj.

— En via aĝo, karulino, mi skribadis taglibron...

— Ho, kia eksmoda afero, avinjo! Mi laboras per kartoteksistemo.

La edzo estas granda libro-amiko. Kompreneble, ankaŭ ĉe la „tago de la libro” li uzas la okazon pligrandigi sian bibliotekon, kvankam la libroj jam apenaŭ havas por si lokon en la loĝejo. Lia edzino akceptas lin drama-voĉe:

— Ĉi tio ne daŭros plu. Elektu: Thomas Mann aŭ mi!

En vir-societo s-ro Kovács demandas:

— Kiu povas diri, kiel oni povas rompi kun virino tiamaniere, ke tiu rompo doloru nek nin, nek la virinon?

— Por tio ne ekzistas solvo — opinias la aliaj.

— Sed ekzistas — diras Kovács. — Oni devas ŝin al si edzinigi.

— Helpu min, sinjoro doktoro — lamentas paciento —, mi konstante parolas en mi mem.

— Tio ne estas ja tiel granda plago — konsolas lin la kuracisto.

— Kiel do ne? Vi tute ne povas pensi, sinjoro doktoro, kiel enuiga parol-partnero mi estas!

Filmstelo en Los Angeles faris sian kvaran edzinigon; lia fianĉo estis franca pentristo. Post la mielmonato lin atakis ĵurnalisto per la demando:

— Ĉu vi estas feliĉa?

— Tre, tre feliĉa mi estas. De nun mi edziniĝos nur al franca pentristo.

Ne estas vere, ke la ĉefoj estas nuraj morozaj homoj. Ĉe iu entrepreno la direktoro sendis voki oficiston kaj diris al li plej ĝentile:

— Mi ne scias, ĉu kaj kiel ni povos daŭrigi nian laboron sen vi, sed ekde la unua de la sekva monato ni ĉiukaze provos tion.

Viktimoj. — He, he! — riproĉas sinjoro gazet-prikriiston. — Kial vi kriadas, ke „granda ĉarlatanaĵo, 80 viktimoj”? Jus mi aĉetis la gazeton kaj menion mi trovis en ĝi pri tio.

La prikriisto plu kriegas:

— Gra-a-anda ĉa-a-rlantana-aĵo, 81 viktimoj!!!

Kiam la hungara lingvo fariĝis oficiala ŝtatlingvo?

En la pli-ol-miljara Hungario certe la plimulto de la hungaroj ne povus respondi la demandon metitan en la titolo. Interesan libron pri la hungara lingvo, pri ĝia „romano” verkis Prof. Géza Bárczi, nia fama kunlaboranto; pri tiu grava verko vi povis legi studon en H. V. (1934. Nro 3.)

Eble vin interesas scii iom el tiu historio. Malmultaj scias, ke iam la hungaroj havis eĉ apartan skribmanieron, la runojn, kies originalajn memoraĵojn oni trovas en Transilvanio, kie vivas gento hungara, la sikuloj. La itala militingĝeniero *Marsigli* en 1690, sur lignolato longa unu kaj duonon da metroj, trovis la skribosignojn kaj notis ilin. La kopion, sur naŭ paperfolioj, oni gardis en Bologna, kaj ĝin hungara esploristo retrovis nur en 1906. Alian runan abocion, el 46 signoj, trovis la hungara Landa Biblioteko tiel, ke el malnova princa biblioteko ĝi aĉetis prapresaĵon, kaj ĉe ties fino, enbindita, kaŝiĝis la pergamenfolio kun la signoj.

Cetere, la fama episkopo-martiro, Gerardo la Sankta, kies statuon oni povas vidi ĉe la Budapeŝta Elizabeta-ponto, priskribis antaŭ mil jaroj kiel bele kantas hungara virino dum peza laborado. Sed la kantotekston neniu notis. Perdiĝis ankaŭ postrestaĵoj de iamaj popolepopeoj kaj mitoj, kiajn havas niaj parencoj, la finnoj kaj estonoj; ili estis ja plenaj de memoroj pri la pagana prareligio kaj tial la kristanaj pastroj kaj monaĥoj ekstermis ilin kun sankta fervoro. La latinlingva „*Gesta Hungarorum*” de *Anonymus Notarius* malestime mencias la „klačadojn” de la popolkantistoj, sed sian kronikon li verkis baze de la tradicio konservata de ĉi tiuj ankoraŭ ĝis la komenco de la 13-a jarcento, kiam lia kroniko pretiĝis. El la sama tempo devenas la „Prediko pri mortinto”, trovebla en la Pray-kodekso kaj gardata en la Nacia Muzeo; ĝi estas la unua hungarlingva teksto. (Ĝian tradukon en „mezepoka Esperanto” oni povas legi en „Lingvo Stilo Formo” de Kalocsay.)

Cetere, ĉio estas latina, kvazaŭ la hungara lingvo estus jam pereinta. Tamen en 1922 oni malkovris la prahungaran poemon „Lamento de Maria”; kun sia evoluinta ritmado, kun siaj rimoj kaj aliteracioj ĝi montras pri ne malalta nivelo de la hungara popolpoezio, sur kies grundo ĝi kreiĝis en la 13-a jarcento. Poste, ree nenio. Sed en la 15-a jarcento penetras la landon la influo de la husanismo kaj la husaniĝintaj hungaraj pastroj volis konvinki la popolon, do verkis kaj predikis hungare. Poste la reformacio uzis la hungaran lingvon samcele, kaj la katolikismo devis reagi tiel same en la hungara lingvo. Aperas la plena Biblio en la hungara tra-

duko de *Gáspár Károli* en 1590 kaj la Psalmoj en la tradukto de *Albert Molnár de Szencz* en 1607. Kaj elpaŝas la unua granda hungara poeto, *Bálint Balassa*, kiel granda surprizo, kun sia animkapta, pia kaj amsopira, plene matura poezio povinta esti ĝi nur sur la bazo de floranta popolpoezio Tamen, el ĉi tiu apenaŭ postrestis io, ĉar ĝi konsistis plejparte el amkantoj, „florkantoj”, kiujn tiel same persekutis la puritanaj reformacianoj, kiel la katolikaj kontraŭreformacianoj. Estas interese, ke tiutempa amkanto postrestis al ni en itala traduko. La tradukinto aŭdis lin kanti de hungara studento en Padova, kaj la studento, laŭ lia peto, ĝin tradukis en la latinan; el la latina pretiĝis la itala traduko. Ankaŭ de *Bálint Balassa* aperis presite nur liaj kantoj religiaj: liaj ampoemoj estis konservataj nur de unu kodekso kaj de cirkulantaj manuskriptoj. El la 17-a jarcento elstaras la epopeo „*Zrinyiado*”, verkita de plej eminenta ŝtatviro kaj militestro de tiuj tempoj: *Miklós Zrínyi la poeto*.

Komence de la 18-a jc. potence ekfloris la poezio en la t.n. „kurucaj” kantoj, kies popoleska nuanco, ludema facileco pruvas, ke devis ekzisti malnova, riĉa popolpoezio, kiun ili daŭrigis en la patriota poezio de la *Rákóczi-insurekcio* kaj post ĉi ties malvenko en la melankoliaj migrul-kantoj.

Poste, en la senespera situacio de ĉia klopodo por libereco, la patriotismo venis en krizon kaj kun ĝi pereis ankaŭ la hungara literaturo kaj lingvo. La magnatoj, por plaĉi al la kortego, uzis la germanan aŭ la francan lingvon, la nobeloj enfermiĝis en la kokonon de la latino. La reĝino Maria Tereza, por germanigi la junajn nobelojn, vokis ilin en sian kortegon, servi tie kiel korpgardistoj. Sed ĝuste ĉi tiuj fariĝis la apostoloj de la nacia lingvo: ili volis krei tian literaturon hungarlingvan, kiam ili admiris ĉe la francoj. La reĝo *Jozefo II.* volis, ke la oficiala lingvo en Hungario estu la germana anstataŭ la mortinta latino. Sed per tio la hungara lingvo fariĝis alloga „malpermesita frukto” En la mortojaro de la reĝo, en 1790, aperis la unua leĝo, laŭ kiu oni instruos en la lernejoj ankaŭ la hungaran lingvon. Post du jaroj la hungara lingvo fariĝis normala studobjekto. En 1805 la leĝo dekretis, ke alskriboj al la hungara parlamento estu redaktataj krom la latina ankaŭ en la hungara lingvo. Fine, post longaj kaj pezaj diskutoj, en 1844 naskiĝis la leĝo, ke la hungara lingvo estu oficiala ŝtatlingvo. Tiun pozicion la pli-ol-mil-jara lingvo do atingis nur antaŭ 126 jaroj.

P. B.

Leterkesto

Kiel iama abonanto al *Literatura Mondo*, ties kelktempa peranto en Anglio, kaj ties okaza kontribuanto, mi sentis profundan nostalgion, legante en via n-ro 4 de 1972-a jaro la artikolojn pri la jubileo de tiu bedaŭrata revuo.

Mi sciigas al vi, ke je la 5-a de Januaro 1973 mi paroladis antaŭ la Londona Esperanto-Klubo pri la jubileo kaj tutspeciala pri la historio de *LM*. — Via Alec Venture, Surrey, Anglio.

Konkurso Simondetti 1973: ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva aljuĝas sian Premion Simondetti de 1000 FB al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo „Natura”. Por 1973 partoprenis ĉi-sekvaj kvin kandidatoj, laŭ malkreska vicigo, el kiuj la unua sekve gajnis: E.W. Chandler el Aŭstralio kun „La Lovano”, G.Gárdonyi el Rumanio kun „Nia Cikonio”, G.Pollard el Aŭstralio kun „La Emuo”, A.Liszy el Hungario kun „Observo de birdaro”, G.H.Atanasov el Bulgario kun „Murhirundo”. Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en „La Mevo”, organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1974 bonvolu la regularon peti de la sekretario M. HALVELIK, Gebr. Blommestraat 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

... Hungara Vivo perspektivas bone la malnovan, novan en via patrolando, ĝiajn vivantajn esperojn kaj forgesitajn glorojn. Sed ĉu en Hungarujo ne ekzistas pura fonto de mondoklaro, kiu vidas, ke la homoj ĉie soifas kaj malŝatas mondkulturon, homaran celon ĉie sur la ter'. — Kial ne via gazeto surprenu rolon de „Mondkulturo”, kaj el fontoj ĉerpu ne nur en Hungarlando sed sur tuta tero. El antikva saĝo tiel same kiel ĉe plej moderna penso, pri arto, literaturo, religio, scienco. La Esperantistaro dankus tian iniciativon kaj la tasko de tia novspirita gazeto spronus avangarde al brulanta fervoro la Hungaran genion! — Via sincere Guy B. Tordoff, Bristol, Anglio.

... Multe ĝojigis min via revuo n-ro 1, kiu ĵus alvenis al mi. Ĝi bone kaj alloge konatigis la hungaron-tutmondulon, kies poezio apartenas al la tuta homaro kaj restos eterne aktuala, ĝis vivos la homaro. — Okaze de la jubileo de Petőfi ni aranĝis en nia E-klubo en Tallinn Petőfi-vesperon kun prelego pri lia vivo kaj deklamado de liaj poemoj. Sendube nia vespero estus ec pli riĉenhava, se la abunda materialo pri li atingus nin pli frue. (...) En la revuo vi donas multan reklamon de diversaj hungaraj firmaoj, Eble povas esti, ke tio al kelkaj legantoj ne plaĉas — la „ortodoksaj” esperantistoj volas vidi nur artikolojn... Sed al mi la reklamo ankaŭ multe parolas kaj ĝi montras, ka la Lingvo atingis la agnoskon en la praktika uzado. — Via estona Johannes Palu, Tallin, Estonio, USSR.

La redaktoro de HV varmkore dankas la bondezirojn de niaj korespondamikoj: Zdenek Hršel, Miroslav Hromas el Ĉeĥoslovakio, Helga Fehr, Franz Peter Kurtz, Ilse Neumann Erich Seidemann kaj Linde Knöschke el GDR, Jozefo Rabi el Hungario, Bernard B. Fritz-Patrick el Rhodesia, Ilija Andreev, Metodi Panĉev el Bulgario, Glauco Corrado el Italio, dr. J. Kondor el Aŭstrio, Arturs Kubulnieks, Saulcerite Neilande el Latvio, USSR, A. Bogdanov el Ukraino, USSR, Boguslav Sobol, Leonia Freundlich el Pollando, Julio Szabó el Rumanio, Robert Murray el Essex, f-ino N. Hanson el Halifax, Anglio, N.A. Collier el Bowen, Aŭstralio.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉifoje — kiel anoncote en la pasinta numero — ni ĉerpos la demandojn el la verko de Sándor Szathmári: *Maŝinmondo*.

1. En la enkonduko de William Auld legiĝas la jena frazo: „Estante polemika laŭ intenco — alie ĝi apenaŭ estus satiro — ĝi estas pli-malpli unuflanka.” Bonvolu skribi la frazon, kiu sekvas ĝin.
2. En la rakonto *Maŝinmondo* rolas juna parlamenta deputito, kiun forlasas la edzino. Kio estas la profesio de la viro, pro kiu ŝi forlasas lin?
3. En iu el la noveloj rolas figuro, kies nomo estas Oln. Kiel nomiĝas lia amatino?

Oni ankaŭ nun respondu *minimume du* el la tri demandoj. La demandojn por la sekva numero ni ĉerpos el la Esperanta traduko de la romano de Géza Gárdonyi: *Sklavoj de Dio*. (Aĉetebla ĉe la Libroservo de HEA kaj de UEA.)

Ĉifoje gajnis libropremion Arne Bengston (Svedlando) kaj Éva Fodor (Hungario). La librojn ni sendis perpoŝte.

Gustan solvon alsendis krome: Bárta František, Miroslav Hromas (Ĉeĥoslovakio), Jürgen Hamann (GDR), Károly Benkő, Zsigmondné Kovács, Csaba Lendyay, János Podani, Károly Ságvári, d-ro Balázs Szemök, István Visy (Hungario), Zbigniew Czupallo, Mieczysław Mackiewicz (Pollando).


Intereskaptaj libroj

La legantaro de HV dum la pasintaj jaroj daŭre ricevis ĝisdatajn indikojn pri la eldona aktiveco de Hungara Esperanto-Asocio, kaj ĝenerale, pri la Esperantaj libroj, aperintaj en Hungarlando. Ni pensas, tamen ne estos superflue atentigi Vin pri kelkaj el ili, kiuj, kompreneble, aĉeteblas ĉe la Libroservo de Hungara Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA en Rotterdam. Unuopuloj prefere mendu ĉe UEA, dum pli grandajn mendojn oni adresu al la Libroservo de HEA. Post la titoloj en la unua kolono staras la prezoj ĉe HEA (en hungaraj forintoj), en la dua kolono la prezoj ĉe la Libroservo de UEA (en nederlandaj guldenoj).

Madách: La Tragedio de l'Homo (Drama poemo) 259 p.	Ft 32,—	gld. 7,20
Sánta: Dudek horoj (Romano) 234 p.	Ft 26,—	gld. 7,—
Baghy-Kalocsay: Ora Duopo 183 p.	Ft 16,50	gld. 6,50
Balázs: Sep reĝidoj 34 p.	Ft 28,—	gld. 6,75
Gárdonyi: Sklavoj de Dio (Romano) 408 p.	Ft 60,—	gld. 10,50
Gvidlibro por supera ekzameno (Movado — Literaturo)	Ft 18,—	gld. 6,—
Petőfi: Libero kaj amo (Poemaro) 160 p.	Ft 42,—	gld. 9,—
Szerdahelyi: Esperanto Internacia (Rektametoda lernolibro) 260 p.	Ft 25,—	gld. 6,—
Ráth-Végh: Patromurdo en la Nigra Muelejo (Rakontoj)	Ft 2,50	gld. 1,90

La supra listo reprezentas nur parton de la Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario. Ni esperas, ke por la Tago de la Esperanta Libro Vi ĉiuj elektos el ili almenaŭ unu, certigante tiel dum la Kristnaskaj ferioj kelkajn tre agrablajn horojn.

PRI SÁNDOR SZATHMÁRI



Ensendi sufičas la solvojn de tiuj vicoj, kiuj
koncernas la verkiston. Limdato: 5-a de januaro

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *La verko kiu alportis al Szathmári mondfamon.* 15. Nomo de virino. 16. Pli malpli granda folio el dika papero. 17. La plej alta perfekteco (Radiko). 19. Birdo, malgranda specio de akcipitro. 20. Ciferon. 22. Rilata al malgranda kvanto. 23. Eminentanta franca pentristo (Gustave, 1819—1877). 25. Preciza klarigo (R). 27. Specio de brasiko (R). 28. Iom post iom forigi el la korpo malutilajn substancojn (R). 29. Tute rapide kaj neatendite okazantaj. 31. Komuna prepozicio. 32. Oficiala aŭ ĵurligita oficisto. 33. Fariĝas ne posedanta parolkapablon. 34. Maljuna (neologismo). 35. Prezidanto de Jugoslavio, alta protektanto de la ĉijara U.K. 36. IP. 37. SF. 38. Rivero en Siberio (ne esperantigita formo). 40. AO. 41. Arbospecio. 42. Deformeble, plastike. 44. 1499 — per romiaj ciferoj. 46. Laŭleĝe kaj jure decidas, taksas. 48. Gaso, konsistanta el nitrogeno kaj hidrogeno (R). 49. Faris. 51. Sono aŭ songrupo prononcata en unu sola voĉellaso (artikolo kaj radiko). 53. Ĉefa arterio (R). 54. Enigmaj vortludoj. 56. Ar' de nitoj. 58. Nitrogeno kaj tantalo. 59. Sirmitaj kontraŭ infekta malsano. 60. Specialforma aperturo (R). 61. Ejnstejnio. 63. Oksigeno kaj karbono. 64. Vi kaj mi. 65. TL. 66. Proporcio parto de tutaĵo (R). 67. Tiel, ke la manĝobezono estas plene kvietigita. 69. Popollegendaro (R). 71. Virina nomo i.a. de la patronino de Parizo (sen -a finaĵo). 73. Numeralo. 75. Gustigis nutraĵon. 76. La viva kalkulmaŝino (Ferenc, pri li vidu artikolon en HV. 61/2). 77. Poseda pronomo. 79. Tian parton de la vesto, kiu kovras la bruston. 80. Speco de katuno (R). 81. Difinita kvanto de medikamento. 83. Duoble kvar loĝkonstruaĵoj. 85. Hodiaŭa. 86. Malbona antaŭsigno. 88. Radiko de la V. 2. 90. Unujaran herbon (E c h i u m L. el borogacoj). 91. *Du revuoj el pluraj, kies kunlaboranto estis Szathmári* (la unua staras en mallonga formo.)

VERTIKALAJ VICOJ: 1. *Du noveloj el la dua libro de Szathmári* (la dua estas titoldona). 2. Paserforma kantbirdo. 3. Ano de iu katolika ordeno. 4. Eksternorma. 5. ĜA. 6. Malpli granda ol orta angulo (R). 7. Reen: prefikso, esprimanta kontraŭecon. 8. *Romano de Cezaro*

ROSETTI. *Szathmári tradukis ĝin hungaren.* 9. Distingilo, insigno. 10. Antikva nomo por la branĉo de celen-teruloj. 11. HI. 12. ...lio: pastoralo. 13. Gaso, uzata por reklama lumigado. 14. Estintaj en ne difinita tempo. 18. *Novelo de la verkisto.* 20. Nea pronom-adjektivo. 21. Kunigi metalajn pecojn per martelo kaj najlo 56. 24. Flugantaj bestoj. 26. La fiŝo havas ĝin. 30. Rilata al la ĉefgento loĝanta en Ekstrem-Orienta ŝtato. 35. Reen: altiĝi en la aeron kaj for de la tero (R). 37. Komenco de la konkuro. 39. Kontraŭleĝa ŝtato koncerne geedziĝon (R). 41. Havantaj certan aĝon. 42. Pseudonimo de Emeriko Baranyai. 43. Monto en Jerusalemo, kun la kastelo de Davido (ne esperantigita formo). 45. Parolu! 47. Personoj. 48. AATT. 50. Havenurbo en Brazilo. 52. Malnova kordinstrumento (R). 55. Usona urbo en ŝtato Texas, fifama pro la mortigo de J. Kennedy. 57. Fama hungara fabrikejo de foto-kemiaĵoj (REANAL). 60. Itala fizikisto (Amadeo, 1776—1856). 62. Bulgara monero, en nacilingva plurala formo (STOTINKI). 66. Parton de pordfermilo. 67. Ili venos post la sesaj. 68. Malokupis lokon. 70. La muzo de la historio sen „a” finaĵo! 72. Administranto de domo aŭ bieno (R). 74. Demanda pronom-adjektivo. 78. Proksima parenco de la ĉevalo. 80. Nomepiteto de duoninsulo en Maro Blanka. 82. Persona nedifinita pronomo. 84. Vestmaniero (R). 87. Oksigeno kaj karbono. 89. Moviĝi per piedoj (R). 90. Sufikso, signifanta unu el la konsistigaj elementoj.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 73/2 (Pri Gyula Illyés) estas:

„Ne povas esti hom' honesta,
kiu mutigas sian liron,
tiu mutigas la verdiron.”

Libropremion gajnis: Jan Szurman, ul. Dubois 20 m 2 58—200 Dzierzonow el POLLANDO; Imre Csepreghy, Oradea, str. Iza 3. Bloc 5—10 Ap. 22. el RUMANIO; kaj István Bodnár 1082 Budapest, Üllői u. 46. II./22. el HUNGARIO.

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ (ĝis la 1-a de Aŭgusto) Atanas Gaev el BULGARIO; Barta Frantisek kaj Mirosław Hromas el CEHOSLOVAKIO, André Bongars el FRANCIO; Rainer Fischer kaj Ilse Neumann el GDR; D-ro J. Kondor el GFR; Károly Benkő, József Biró, Lászlóné Bognár, ing. Ferenc Egry, Zsigmondné Kovács, Károly Magyar, János Podani, Károly Ságvári, kaj Sándor Varga el HUNGARIO; Teodoro Löwenkopf el ISRAELO; Hukaja Sitosi el JAPANIO; Maria Grochowska kaj Urszula Zabek el POLLANDO; Imre Jámbor kaj Julio Szabó el RUMANIO; Rein Kiviari kaj Nikolaj Rysovec el SOVETUNIO; Hugo Löfgren el SVEDIO.

FERI

Medicinhistoria Muzeo

La *Medicinhistoria Muzeo Semmelweis* estas lokita en la naskodomo de la granda obstrektikisto Ignaco Semmelweis, „savanto de patrinoj”, ĉe la suda piedo de la Budaburga monto. En la Muzeo estas spektebla la konstanta ekspozicio: „Bildoj el la paseo de la kuraco”; ĝi montras la sciencan kaj praktikan de la medicino ekde la „kuracarto” de la prahomo ĝis la 20-a centjaro. Oni aranĝas tie ankaŭ diversajn periodajn ekspoziciojn alterne, ekz-e oni ekspozicias la historion de la okulkuraco, zorge gardatajn trezorojn de la biblioteko, kuriozaĵojn de la medicino ktp. Al la muzeo apartenas, krom granda propra biblioteko, ankaŭ la Apotekhistoria Biblioteko nun preparata en la malnova apoteko „Ora Aglo”. En Budapeŝto oni aranĝos la 23.-an Internacian Medicinan Kongreson en 1974.

POPOLFABELOJ

SIMPLA FABELO

Ĉu vivis, ĉu ne vivis, vivis iam pesimisto. Nu, ĉi tiu pesimisto renkontis iutage optimiston.

— Kien, kien? — demandis la pesimisto.

— Mi iradas — respondis la optimisto.

— Ĉu vi amas iradi? — demandis la pesimisto.

— Mi amas iradi — respondis la optimisto.

— Mi ne amas iradi — diris la pesimisto.

Poste ili iradis plu.

FABELO PRI LA ETA—TRE—ETA BURĜO

Foje, iame, antaŭ longe-tre-longe, kiam ankoraŭ vivis etaj-tre-etaj burĝoj, vivis eta-tre-eta burĝo. Tra la fenestro de ĉi tiu eta-tre-eta burĝo en bela aŭgusta nokto enflugis feino lazur-flugila.

— Bonan vesperon, eta-tre-eta burĝo! — salutis lin la feino.

— Bonan vesperon, feineto. En kia afero vi venis ĉi tien, kie eĉ birdoj ne vizitas?

— Mi venis por vin demandi, ĉu vi ne havas ian deziron.

— Mi ne havas, feineto.

— Tamen, ĉu vi ne sentas iomete ĝena... en la nuna epoko, kiam la homoj kreskis tiel grandaj... do, ĉu vi ne sentas ĝena vian staturon?

— Jes, mi sentas ĝin ĝena, feineto.

— Mi ĝojas, ke vi min komprenis.

Ĉu mi faru por vi miraklon?

— Se vi estus tiel kompleza, feineto. Ege mi amus esti iomete, ne multe, sed ĝuste nur iomete pli malgranda.

FABELO PRI LA VESPERA STELO

Nu, okazis foje, ke la poeto — ankaŭ mem filo de popolo malriĉa — demandis ŝafiston, kiu, surhavante nigran kampulpelton, apogis sin sur sia bastono.

— Ĉu vi vidas la vespersteleton, oĉjo Gasparo?

— Mi vidas ĝin.

— Rakontu pri ĝi iomete. Vi scias, en la urbo ni tute forŝiriĝas de la veraj belaj fabeloj.

— Do, kion mi rakontu? — kontemplis reve la ŝafisto la stelornamitan alton. — Post la Suno kaj Luno ĝi estas la plej brila astro. Ĝian surfacon kovras konstanta densa flave-blanka nuboj, kiu reflektas ĉirkaŭ sepdek procentojn el la sunlumo. En ĝia atmosfero troviĝas multe da karbona dioksido, sed neligitan oksigenon ĝi verŝajne ne havas.

POPOLFABELO PRI LA POPOLFABELO

Ĉu vivis, ĉu ne vivis, vivis iam fabelisto. Kaj ankoraŭ unu, kaj ankoraŭ unu, kaj ankoraŭ unu, kaj ankoraŭ unu, ankoraŭ unu.

Tradukis: Johano Tóth

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan, interesan karakteron por ĉiuj numeroj de Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadas bone el la numeroj de Hungara Vivo — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvopraktikadoj, ktp. Ĉi tiuj numeroj estas ankoraŭ mendeblaj, aĉeteblaj.

Ni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

3/1971 — numero pri K. Kalocsay

4/1972 — numero pri Literatura Mondo

1/1973 — numero pri Sándor Petőfi, poeto

2/1973 — numero pri Gyula Illyés, poeto

3/1973 — numero pri Budapeŝto

4/1973 — numero pri S. Szathmári, verkisto

Kaj el la sekvantaj numeroj:

1/1974 — numero pri la originala Esperanta prozo

2/1974 — numero pri la hungara ekonomia vivo

3/1974 — numero pri la originala Esperanto-poezio

4/1974 — numero pri la hungara scienco

Redakcio de HV

KORESPONDI DEZIRAS

BULGARIO: Junulara klubo de Internacia Amikeco dez. kor. kun diversaj landanoj por plifortigi la amikecon, organizi ekspozicion, laŭeble aranĝi reciprokajn vizitojn. — Mladejki Dom, Interklub, SUMEN. — Deziras havi kontakton kun esp-ista ekslibrisŝatanto: Metodi Panĉev, SOFIA 7, Str. Persenk, Blok 16, Vhod II.

FRANCIO: Dek francaj lernejoj, anoj de la progresema movado FREINET, dez kolektive rilatigi siajn lernantojn (9—12 j.) el la tuta mondo: skribu al LENTAIGNE, 3, av. de la Gaillarde, 34000 MONTPELLIER.

Germana Demokratia Respubliko: Karl Jos. Th. Bannert, lingvoinstruisto, DX 8801, ZITTAU 2, Hartauer str. 15. — Helga Fehr 49-j., serĉas *leteramikojn ĉefe el Hungario: 1017 BERLIN, Singerstr. 66.*


HUNGARIO: Lendvay Csaba, 17-j. lernanto, interes. pri la matematiko, kemio: 8900 ZALAEGRSZEK, Marx tér 3. I. em. 1. Molnár Sándor lernanto, kor. dez. kun 12-j. knaboj, interes. pri la historio, fiziko, matematiko, lingvoj: 1138 BUDAPEST XIII. Karikás Frigyes u. 4/a, V. em. 40. F-ino Suzana Tóth, 16-j. lernantino, interes. pri sporto de motoro, literaturo, kolektas bk, gram. disk. aktor-fotojn: 4028 DEBRECEN, Sámsoni út 31.

POLLANDO: Wanda Lewicha 15-j. lernantino, 59.300 LUBIN, u. Odrodzenia 20 m 7. — 15—18-j. lernantoj de faklernejo, Esperanto-grupo Zasadnicza Szkoła Górnicza 59.300 LUBIN, ul. Legnicka 3. — 15—19-j. gelernantoj, Esperanto-rondo ĉe MOK, 59.300 LUBIN, u. Odrodzenia 32. — 15—19-j. gelernantoj de mezlernejo, Esperanto-grupo ĉe Liceum Ogólnokształcące, 59.300 LUBIN, Kopernika 7. — Barbara Janicka, KALISZ 62-800, ul. Szopena 14/6. — 14-j., hobiaj: sporto, geografio, bk. pm. — Maria Czarniak 22-j., interes. pri literaturo, muziko, vojaĝoj, bk.: 34-146 STRYSZÓW 95, pow. Wadowice, woj. Kraków. — Barbara Ernest, u. A. Fredry 10, 89-600 CHOJNICE. — Interes. pri muziko, literaturo, turismo, filmo. — Mariusz Kabzinski, ul. Budowlanych 10/5. 62-200 GNIEZNO. — 18-j. interes. pri turismo, bk., diskoj. — Alina Madziewicz 18-j. fraulino, interes. pri libroj, filmo, muziko, kaj Esperante, kaj germane, ruse: 02 692 WARSZAWA, ul. Jazdwingów 5/7—78. — Urszula Wozniak, Leszna Górna 119, 43-440 GOLESZÓW, pow. Cieszyn, woj. Katowice. — 19-j. fraulino, kolektas fotojn de kantistoj, bildkar-tojn.



**Kun ríca
sortimento
de
artobjektoj
ni atendas
vin**

Konsumturist



**Niaj varoj
doganlibere
estas
elportebraj
el la lando**

HUNGARHOTELS INFORMACIO



organizado kaj aranĝado de
ĉambromendo - monŝanĝo - kongresoj
nuptofesteno - bankedoj - koktelpartioj
tablorezervigo - kelvizitadoj - aranĝaĵoj
kavalkad - prezentadoj - presioakceptoj
sur tuta teritorio de Hungario

